MEGYEI KÖNYVTÁR
LGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

5
1981
13,–Ft

malpliigas
elfalon,
stimulas
kreskadon
de haroj
HERBÁRIA
LIKVAJO
BÁNFI
Országos
Gyógynövényforgalmi
Közös Vállalat
Bánfi
HAJSZESZ
Gyógynövénykivonat
HAJHULLÁST CSÖKKENTI
ÉS HAJNÖVEKEDÉST SERKENTI
Országos
Gyógynövényforgalmi
Közös Vállalat
Bánfi
HAJSZESZ

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIa jaro, 1981 n-ro 5
(99)

ENHAVO

László, I.: Regionoj de Hungario – Departemento Békés 162
Szilárd, B.: Internacia jaro de Handikapuloj 164
Fenyvesi, E.: Tódor Kálmán 165
Benczik, V.: Ekonomia kalejdoskopo 166
V. *B.*: Sojofabo – gajnita por la homo 167
Fenyvesi, E.: Murmureto inter muregoj – La Burgo de Buda 168
Pilinszky, J.: Apokrifo (A.*Hules*) 171
Sapfo: Amkonfeso (K.*Kalocsay*) 172
Puŝkin: La diabloj (K.*Kalocsay*) 173
Benczik, V.: Li estus 90-jara... 173
Benczik, V.: Kio fontos el „FONTO" 175
Tóth, E.: Pato 176
V. *B.*: Skulptisto Imre Varga 179
V. *B.*: Panoramo 180
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 183
D-ro *László*, F.: La prospero de la Budapeŝta akvoprovizado (E. *Fenyvesi*) 184
Thurzó, G.: La mapo de steloj (L. *Mauksinszky*) 191
Zelk, Z.: Violono savita el fajro (I. *Szabó*) 191
Bálint, Sz.: Altirforto de la mono 192
Danovskij, N.: Puŝkin kaj aŭtuno en Esperantujo 193
Silva, E.C. da: Malrapidiĝu! 193
Varga, J.: Du arboj 193
Giorgi, A. de': Senpersoneco 193
Paĝo de komencantoj: Bulgara popola fabelo (I. *Takács*) 195
Recenzoj de G. *Mihalkov*, V. *Goñŝtein*, E. *Fenyvesi* 196
Gaja paĝo (E. *Fenyvesi*) 199
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 199
Leterkesto; Korespondi deziras 200

Sur la titolpaĝo: Bildo el la historia urboparto de Buda (Foto de Z.*Fejér*)

Antaŭ 90 jaroj...

naskiĝis Kálmán Kalocsay, unu el la plej potencaj figuroj de la Esperanta kulturo. Li laboris por Esperanto dum ses jardekoj, kaj malmultaj personoj tiel signife influis la evoluon de la internaci-lingva kulturo kiel li. Tiu ĉi numero ne estas speciala Kalocsay-numero, sed okaze de la apero de lia giganta duvoluma tradukantologio TUTMONDA SONORO, Hungara Vivo deziris omaĝi al lia memoro.

Ŝatantoj de literaturo verŝajne estos kontentaj pri la enhavo de tiu ĉi kajero. Oni trovas en ĝi bonkvalitajn tradukitajn poemojn, el kiuj meritas apartan mencion la grandioza *Apokrifo* de la ĉijare mortinta János *Pilinszky*, elstara figuro de la moderna hungara poezio. La novelo *La mapo de steloj* de Gábor *Thurzó* pleje plaĉos al poeziamantoj, pro sia ŝvebe melankolia, lirika atmosfero. La originala novelo *Pato* de Endre *Tóth* havas alian tonon: ĝi estas krimrakonto, tamen kun fino nekutima – el ĝi radias la ironia amaro, tiom karakterizo por la noveloj de *Tóth*.

Kvankam ĉi-numere abundas literaturaĵoj, ne mankas alispecaj artikoloj. *Ekonomia kalejdoskopo* deziras doni bazajn informojn pri la hungara ekonomio, en kiu lastatempe aplikiĝas iom novaj principoj. Ni supozas, ke tiaj informoj povas havi intereson por niaj legantoj, sendepende de tio: ĉu ili loĝas en socialismaj aŭ kapitalismaj landoj. La serio *Regionoj de Hungario* prezentas nun la departementon *Békés*, alia artikolo la historian urbokernon en *Buda*, pli malnova parto de Budapeŝto.

Oni retrovas en tiu ĉi numero ĉiujn kutimajn rubrikojn – mankas nur krucenigmo. Eble mankas ankaŭ iom pli da eksterlandaj kontribuantoj, sed certe oni pardonos al ni, ke tiu ĉi numero eble iom tro hungariĝis. Sed finfine ja temas pri *Hungara* Vivo, ĉu ne?

Ĉi-foje mi deziras doni al vi konkretan proponon, kie eklegi la nunan numeron? Sur la paĝo 174, kie troviĝas reklamo pri la ĵus aperinta verkego de Kalocsay – kaj la impona listo de 185 poetoj nepre decidigos vin aĉeti TUTMONDAn SONOROn, kiu certe meritas la titolon «ĉefverko '81».

Regionoj de Hungario



Departemento Békés

Ankaŭ tiu departemento – kiel la jam prezentita Hajdú-Bihar – situas ĉe la orienta landlimo de Hungario kaj havas tute ebenan karakteron. Sur ĝia teritorio troviĝas nek arbaroj, nek altaĵoj, la tuta teritorio de la departemento estas eluzata, kiel kamparo.

La ĉefurbo kaj samtempe kultura centro kaj trafika nodo de la departemento estas *Békéscsaba,* kun 63 000 da loĝantoj. La historio de la urbo komenciĝas en la unua jarcento. La vera urbo formiĝis dum la jarcento 13, sed ĝi preskaŭ ruiniĝis tute pro la invado de la tataroj, poste dum la okupo de la turkoj. Sekve de tiuj katastrofoj granda parto de la regiono fariĝis senpopola kaj la pliiĝo de la loĝantaro komenciĝis nur en la 18-a jarcento. La evoluo de la urbo datiĝas de la ekesto de la fervojlinioj, kiam Békéscsaba havis konsiderindan disvolviĝon. Je la fino de la deknaŭa jarcento ĝi plenumis gravan rolon en la historio de la agrar-socialismaj movadoj. Pluraj grandiozaj agrarproletaj batal-eventoj okazis en la ĉefurbo de la departemento, Békéscsaba. Pro tiuj oni nomis la regionon „ŝtorm-angulo".

Promenante en la urbo, nian rigardon baldaŭ ekkaptas la interesa statuo-promenejo. Tie troviĝas la statuo de eminentuloj, kiuj faris multe por la urbo, ekzemple tiuj de Mihály *Munkácsy* la pentroartisto, Béla *Bartók* kaj Zoltán *Kodály,* la konataj komponistoj.

Antaŭe la urbo estis ekskluzive agrarkaraktera. Post la dua mondmilito komenciĝis granda evoluo ne nur en la agrara industrio, sed ankaŭ sur aliaj terenoj. Hodiaŭ Békéscsaba havas konsiderindan viandindustrion, krome konstru-industriajn fabrikojn, vestaĵfabrikon. Ĝia pres-industrio havas tutlandan reputacion. La modernaj loĝkvartaloj, publikaj institucioj okulfrape pruvas la evoluon de la urbo.

El fremdultrafika vidpunkto grava urbeto estas *Gyula,* situanta proksime al la hungara-rumana landlimo. Pro ĝiaj agrablaj kuracbanejo, kulturaj establaĵoj kaj historiaj memoraĵoj ĝi estas ĉiam pli frekventata provinca urbo. En la mezepoko elformiĝinta urbeto estis 130 jarojn subpremata de la turkoj, kaj en la jaro 1694 ĝi fariĝis libera. Poste dum kelka tempo ĝi estis la ĉefurbo de la departemento Békés. La burgo de Gyula estis konstruita dum la dekkvina jarcento. Ĝi estas unika brik-burgo el la mezepoko. En 1962 oni restaŭris ĝin kaj nuntempe ĝi estas kultura centro. Somere oni aranĝas tie teatrajn prezentadojn kaj la gvidantaro de la urbo faras ĉion por tio, ke la urbo fariĝu t.n. festivalurbo, alloganta ĉiam pli grandan fremdultrafikon. En Gyula naskiĝis Ferenc *Erkel,* kreinto de la hungara opero kaj de tie devenis la mondfama germana grafikisto Albert *Dürer.* Hodiaŭ speci-

La Granda Preĝejo en Békéscsaba

Nova kvartalo en Békéscsaba

La lago ĉe la Fortikaĵo de Gyula estas ŝatata ripozejo



La ŝtata bieno en Mezőhegyes estas fama pri la ĉevalbredado.
Sur la bildo venkinto en pluraj konkursoj – la kvino „Nonius"

alaĵo de Gyula estas la granda viandindustria fabriko, kiu pere de la popularа „kolbaso de Gyula" fariĝis tre konata. Ĝia eksporto al diversaj Eŭropaj landoj estas signifa.

Ni ne forgesu ankoraŭ pri la grandioza Burgo-banejo, kiu estas renoma kuracbanejo, kaj situas sur 35 hektara praparko, proksime de la bordo de la rivero Kőrös. Ĝi estas unu el la plej popularaj fremdultrafikaj specialaĵoj de la ĉirkaŭaĵo. Ĝia 42°, resp. 70 °C kuracakvo servas por la resanigo de reŭmatismaj malsanuloj.

La urbeto *Szarvas,* havanta 20 000 loĝantojn, ankaŭ proponas plurajn vidindaĵojn por la turistoj. La granda mecenato de la urbo, Samuel *Tessedik* pastro-scienculo, ĉi tie fondis la unuan agrar-lernejon de Eŭropo kaj li estis la unua, kiu per scienca eksperimento iniciatis igi fekunda la magran, sodan grundon.

Grava vidindaĵo estas en la urbo la t.n. „Ĝardeno Pepi", kiu estas granda botanika parko kun multaj ekzotikaj vegetaĵoj. En alia, malpli granda botanika kolektaĵo troveblas la plej granda etern-verda kverko de Hungario.

La urbeto abundas ankaŭ je konstruaĵoj el la historia pasinto kaj havas plurajn termoputojn, kies akvon oni utiligas ĉe la urba banejo.

Orosháza, la iama plej granda hungara vilaĝo nuntempe havas 36 000 loĝantojn. Kvankam ĝi havas nenian specialan fremdultrafikan altirforton, tamen ĝi famiĝis en la lando per tio, ke ĝia loĝantaro, kiel konscia agrarproletaro, plej ofereme luktis por sia homa progreso. La ekonomian vivon de la urbo karakterizas la agrikulturo, sed nuntempe ankaŭ ĝia industrio evoluis konsiderinde.

Mezőhegyes estas tradicie fama pri sia ĉevalbredado. La ĉevalaron oni fondis en 1785, kaj de tiam per bredo de pluraj elstaraj rasoj ĝi akiris internacian reputacion.

En *Gyoma* la „Presejo Kner" fondita en 1882 fariĝis internacie fama institucio de la liter-arto. La plej belaj eldonaĵoj de la unuaj jardekoj de nia jarcento eliris el tiu presejo. La presejo ĝis nun funkcias, kaj de 1970 ĝi fariĝis presej-muzeo.

Dévaványa, la sud-orienta angulo de Hungario fariĝis fama pri la rara birdo-raso: la otido. La grandstatura birdo (serĉe oni nomas „hungara struto") ekstermiĝis el ĉiuj trovejoj de Eŭropo. Ĉi tie oni kreis tutmonde unikan rezervejon de la otidoj.

La historion de la E-movado en departemento Békés oni povas kalkuli ekde la unuaj jaroj de nia jarcento.

János *Valentini,* iama urba oficisto estis la unua, kiu en 1907 individue lernis Esperanton. Baldaŭ li faris bazgradan ekzamenon kaj abonis Esperantajn presorganojn. La unua grupa lingvokurso kun 40 kursanoj okazis en 1924. En la sekva jaro fondiĝis loka grupo de HESL (Hungara Esperantista Societo Laborista).

La unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto dum 1929 sekvis granda kampanjo. La tiam komenciĝintan lingvokurson finis 70 personoj. Dum la 30-aj jaroj eĉ pliiĝis la lingvokursoj. En 1956 okazis en Békéscsaba la 5-a Sudhungarlanda Esp. Renkontiĝo.

El la nuntempaj eventoj elstaras SEU (Somera Esperanto Universitato) kiun oni aranĝis ĉijare la deknaŭan fojon. Paralele kun SEU okazas ankaŭ

Ĝardenoj de ekzotikaj plantoj en Szarvas

perfektiga kurso por pedagogoj kaj lingva tendumado por lernantoj de baz- kaj mezlernejoj.

Ekde 1969 oni aranĝas ĉiujare Esperantan studkonkurson en Békéscsaba. Pasintjare fondiĝis Esperantobiblioteko en Gyula.

Krom Békéscsaba kaj Gyula funkcias Esperanto-grupoj en Sarkad, Orosháza, Tótkomlós, Kardoskút, Endrőd, Füzesgyarmat, Szabadkigyós. En kelkaj specialigitaj lernejoj oni instruas Esperanton kiel devigan studobjekton.

István *László*

Internacia jaro de Handikapuloj*

Dum la 31-a sesio la Asembleo de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) la jaron 1981 deklaris Internacia Jaro de Handikapuloj. La celo de la internacia jaro estas la plifortigo de socia prizorgo de handikapuloj, por ke ili povu laŭ la eblecoj trovi sian lokon inter la sanaj homoj, laborante konvene al siaj kapabloj. Grava afero estas ankaŭ la konsciigo pri la tiurilata respondeco en la laborejaj kaj loĝlokaj kolektivoj.

La hungara kadroprogramo de la internacia jaro celas la solvon aŭ faciligon de tiuj zorgoj, kiuj sekvas el la handikapiteco. La ŝtato faras gravajn fortostreĉojn por la handikapitoj, per la plej bona medicina priservado, per bona organizo de la viv- kaj laborcirkonstancoj, per larĝigo de la lernada, kvalifikiĝa, kultura kaj sportaj eblecoj. La sociaj organizoj alvokis la hungaran popolon, egale la junularon kaj la plenkreskulojn kunlabori en la efektivigo de tiu nobla celo.

Antaŭ ol ni parolus pri la jam konkretigitaj helpoj de la diversaj forumoj kaj homoj por la handikapuloj, ni devas mencii la blindulojn, surdulojn, mutulojn, homojn mense difektitajn.

Krom la denaskaj handikapuloj, ni devas paroli pri la kaŭzoj de tiuj faktoj, kiuj okazigas la akcidentojn. Ofte kulpigeblas mem la infanoj. Laŭ la informoj, donitaj de la ĉefkirurgo de budapeŝta infanhospitalo, dum la someraj ferioj ege plialtiĝas la infanakcidentoj, ofte tagnokte oni devas kudri, bandaĝi, gipsi, operacii, kuraci akcidentitajn infanojn. Ofte oni devas amputi kaj poste dum la tuta vivo mankas la brako, la kruro aŭ la rompiĝinta ŝpino kaŭzas eternan paraliziĝon. Pasintjare en tiu ĉi hospitalo estis akceptitaj 5687 infanoj, kaj el ili multaj restis kripluloj.

Verŝajne similaj kaŭzoj produktas en la tuta mondo la multajn dekmilionojn da handikapuloj. La alia granda parto de suferantoj de akcidentoj estas maljunuloj. Bedaŭrinde la rezulto estas la sama, kiel ĉe la infanoj.

Sane pensanta handikapulo volas labori, sed se oni perdis brakon aŭ manon, ofte oni devas lerni por havi novan profesion, konvenan al la reduktiĝintaj kapabloj. La ŝtataj institutoj kaj la laborejaj sociaj organizoj faras ĉion eblan por tio, ke handikapuloj refariĝu en la laboro plenvaloraj homoj.

La ŝtata kaj socia prizorgado ebligas tion, ke en Hungario laboras 34 mil blinduloj, sed ili ankaŭ ricevas krompagon pro la blindeco. La senperan kontakton kun la blinduloj tenas la Landa Federacio de Blinduloj, kies ĉefa tasko estas akceli la partoprenon de la viddifektitaj personoj en la organizita laboro.

Ĉijare, omaĝe al la internacia jaro de handikapuloj, la federacio organizis en la Budapeŝta Muzika Akademio koncerton, kies rolantoj estas la ĥoro „Homeros" de blinduloj. La koncerto estis eternigita sur gramofondisko. Ankaŭ okazis fotoekspozicio pri la vivo de la blinduloj, kies enspezon oni uzas por la blinduloj.

En 1975 hungara inventisto patentigis vidsentplibonigan aparaton. La specialaj okulvitroj ne havas lensojn, tamen ili certigas perfektan vidon tiam, se eĉ la plej dikaj ordinaraj okulvitroj ne plu povas helpi. Nature, tiuj okulvitroj ne estas panaceo, ĉar tutblindajn homojn ili ne povas helpi, sed homoj kun forte reduktita vidkapablo entuziasme laŭdas ĝin.

Grava helpo por movdifektitaj personoj estas aŭtomobilo. Ĉiuj posedantoj de la speciala aŭtomobilo „Trabant Hycomat" ricevas senpage monate 35 litrojn da benzino. Tiun aŭtomarkon oni vendas por senimposta prezo, kompreneble nur al handikapuloj.

Multaj personoj per la helpo de artefarita membro aŭ ruliĝanta ŝovĉaro revenas al la vivo post la malĝoja akcidento. Ili devas adaptiĝi al la pli malfacilaj vivkondiĉoj, al la mondo de la sanaj homoj. Ili devas lerni tiun fakton, ke nur la plenvalora homo povas vivi en tiu rapidiĝanta, senindulga mondo. Tiu adaptiĝo tamen povas faciliĝi, se la socio-familio, laboreja kolektivo kaj ĉiuj homoj – montras helpeman sintenon al la handikapuloj.

Bálint *Szilárd*

* Laŭ PIV estus pli ĝuste paroli pri „invalidoj", sed ĉar la revuo „Esperanto" preferis traduki tiun koncepton vastigante la sencon de la radiko „handikap-", HV uzas la saman vorton, por certigi la terminologian unuecon

En Budapeŝta hospitalo per gimnastikado oni kuracas infanojn, kiuj suferas je Heine-Medin malsano



Tódor Kármán

la majstro de l'aerodinamiko



La supran titolon povus rajte anstataŭi la *majstro de la raketoj,* aŭ *de la reakcio-kinetiko,* aŭ *la patro de l' aviado super sonrapido;* Tódor Kármán, origine maŝininĝeniero, laŭ la samfakuloj havas rajton je tiuj, ankaŭ je aliaj respektoplenaj titoloj. Menciante ilin, la leganto jam ricevis iom da informo pri la sciencaj – kaj inĝenieraj – sferoj de Kármán, kaj pri la tutmonda taksado de liaj plenumoj.

Ĉijare oni memoras pri la centjara jubileo de l' naskiĝo de tiu eminenta persono de la tekniko, kiun la historio kaj lia genio destinis esti profesoro en trilandaj universitatoj kaj doni sian nomon al esplorinstituto – en kvara lando. Tiun karieron komencis „mirakla infano", kiu en kapo multobligis kvinciferajn nombrojn, kaj tial donis cetere al la patro – fama pedagogo kaj verkisto – pli da tima zorgo ol da kontento. Tamen, la timemo pro la tro inteligenta frueco montriĝis superflua: Teodoro kiel gimnaziano akiris la ĉefajn premiojn de tutlandaj konkursoj pri matematiko kaj fiziko, kaj manifestis profundajn konojn kaj en la teoria sfero, kaj en la aplikado.

Tiu duobla tendenco ankaŭ poste altgrade manifestiĝis en lia laboro: la scienca analizado, precizema esplorado kune kun kuraĝa, pionira aplikado de la teoriaj rezultoj en la *plej modernaj sferoj* de la tekniko. Kaj kio alia estis komence de nia jarcento pli moderna, pli vastan horizonton promesanta ol la ĵus sukcesinta aviado de aparatoj *pli pezaj ol la aero?* Unuavice al tio dediĉis siajn kapablojn, restante *pioniro* dum sia longa vivo en tiu kampo.

La studento Kármán en 1902 akiris la diplomon en la Budapeŝta Politeknika Universitato, kie li tuj ekinstruis apud siaj famaj profesoroj. Baldaŭ invitis lin *Göttingen* por profesori pri hidro- kaj aerodinamiko, kaj en tiu fako li publikigis – antaŭ la unua mondmilito – malkovrojn pri la kirloj, devenantaj malantaŭ la kuranta ŝipo. La leĝo pri *kirlo-serio de Kármán* – tiel oni nomas ĝin tutmonde – montriĝis fundamenta en la hidrodinamiko, same en la aerodinamiko, speciale por la formado de l' aloj (flugiloj) kaj ĝenerale por projektado de ĉia aviadilo.

Sed komenciĝis la unua mondmilito, kaj la soldatiĝinta profesoro en la armea teknika instituto bonŝance kunlaboris ĝuste kun Oszkár *Asbóth* (aŝbot), unu el la inventistoj de la moderna helikoptero. El la longa vico de la tiutempaj rezultoj pri la aviado, kaj teoriaj, kaj praktikaj, ŝajnas interese mencii la konstruon de *ankrita helikoptero,* kiu devas anstataŭi la tro facile rimarkeblan, do likvideblan observan balonon.

Dum la Hungarlanda Konsilio-respubliko (1919) Kármán revenis al Budapeŝto por okupi funkcion en la Komisariato pri Edukado (ministerio). Li grave partoprenis en kreo de *reformo* pri la politeknika edukado; liaj ankaŭ nun validaj principoj celis instrui al la studentoj ĝeneralajn teoriajn sciojn, kiel firman bazon, sur kiuj aldoniĝas la fakaj, specialaj konoj, rapide modifeblaj konvene al la bezonoj de la socio kaj de la teknika evoluo.

La venĝema kontraŭrevolucio eksigis lin ankaŭ el la universitato, kaj manke de alia ebleco li provis labori denove en Germanio. Ĉe universitato de *Aachen* li kreis kaj direktis famiĝintan esplorinstituton pri aerodinamiko, kie li sukcese esploris, precipe koncerne la senmotoran aviadon (glisadon). Por organizi similan instituton, la universitato de *Pasadena* en Usono invitis lin, kaj kiam la faŝismo jam plifortiĝis en Germanio, Kármán definitive forlasis ĝin kaj transloĝiĝis al Pasadena.

La jam mondfama aŭtoritatulo de l' aviado kun plena energio daŭrigis sian laboron por ties disvolvo, aliflanke faris plu la instruadon. Tion li devis (kaj kapablis) fari pere de sia meza angla lingvoscio, restanta ĉiam iom hungareca, kvazaŭ Budapeŝta... Multon oni rakontis pri tiuj prelegoj, pri aviadaj specifaĵoj kaj abundaj inĝenieraj spertoj de la scienculo, kiu *dekomence* akompanis la mirindan evoluon de la aviado... kaj oni rakontis ankaŭ pri la humuraj aferoj de la profunde distrita profesoro...

Li prilaboris la teorion pri la aloprofiloj por la supersona rapido, kio sekvis liajn malkovrojn pri la fluocirkonstancoj de l' aero dum tiu rapideco. Grava parto de liaj plenumoj okupiĝis pri la reakcia movigo, pri teorio de fuziloj, de jet-aviadiloj, pri brulaĵoj de raketoj, speciale pri solidbrulaĵoj, pri raketo-dinamiko kaj nelistigeblaj aliaj. Li delonge klare vidis la futuron de la raketoj, kaj kiel starthelpanto de aeroplanoj, kaj kiel interkontinentaj pafaĵoj, kaj aktive partoprenis la disvolvon, havante eksterordinare penetran menson kaj rapide pensantan kaj deduktantan cerbon. Pli ol cent valoraj studoj kaj libroj forlasis lian skribotablon – la plimulto de tiuj rilatas la jet-peladon en la supersona sfero, sed estas gravaj ankaŭ tiuj pri kristalografio.

Kármán komprenis bone la porhomaran gravecon de la kosmaj esploroj, ties internacian signifon. Tiucele li multe klopodis por organizi la Internacian Asocion de Astronaŭtiko, por interligi la naciajn branĉojn de tiu novega scienco. Honorita per la plej altaj Usonaj, hungaraj kaj alilandaj sciencaj dekoroj, li mortis en sia 82-a jaro, alte plenuminte siajn vivcelojn.

Ervin *Fenyvesi*

Ekonomia kalejdoskopo

En nia lando dum longa tempo la vendopreza nivelo de varoj kaj servoj estis malpli alta ol ties produktokostoj: la diferencon kovris la ŝtato, kompreneble per mono prenita imposte el la kaso de la entreprenoj, kiuj produktis la koncernajn varojn. Tiu sistemo rezultigis, ke la subvenciado de prezoj tro ŝarĝis la ŝtatan kason, kaj aliflanke la prezoj (kiuj ne respegulis reale la produktokostojn) ne povis racie influi la konsumantojn.

Dum la pasinta kaj la nuna jaro oni multe modifis la prezosistemon: estis altigitaj la vendoprezoj de multaj varoj, kaj samtempe oni malpliigis la impostojn de la entreprenoj. Tiamaniere fine de 1980 la nivelo de la vendoprezoj estis 1,5 % pli alta, ol la produktokostoj. Tio estas tre modesta rezulto, ja ideale tiu diferenco devus esti ĉ. 10 %, do, la vendoprezo de varoj kaj servoj devus enhavi ĉ. 10%-an puran profiton; por atingi tion (paŝo post paŝo) necesos pluaj prezaltigoj kaj samtempe pli efika laboro, kiu povos redukti la produktokostojn.

La raciigo de la prezoj ne signifas, ke oni rezignis pri subvenciado de bazaj varoj. Jen kelkaj ciferoj pri la diferenco inter prezoj kaj produktokostoj (en procentoj; se aperas minuso /-/, temas pri subvencio, se pluso /+/, ĝi signifas tiuprocentan imposton):

Nutraĵoj	-13,0
Alkoholo, tabako ktp.	+46,5
Vestaĵoj	+17,7
Veturiloj kaj varoj el metalo	+18,5
Kemiaĵoj	+12,0
Aliaj industriaj varoj	+ 8,6
Hejtmaterialoj por hejmoj	-101,8
Benzino ktp.	+33,5
Konstrumaterialoj	0
Medikamentoj	-222,0
Servoj (transporto, kulturo ktp.)	-38,4

Dum la pasintaj du jaroj la nivelo de vendoprezoj altiĝis 9-9 procentojn. Por la sekvaj jaroj la registaro antaŭvidas nur ĉ. 4-5 %-an jaran inflacion: la necesan 10 %-an diferencon inter prezoj kaj produktokostoj oni volas atingi unuavice per pli produktiva laboro.

Dum la lasta jardeko la hungara agrikulturo reakiris sian iaman internacian prestiĝon: ne nur per la alta kvalito de siaj produktaĵoj, sed ankaŭ per la impona evoluoritmo. Dum la 26-a Kongreso de la Komunista Partio de Soveta Unio la ĝenerala sekretario Breĵnev trovis aparte laŭdajn vortojn por ĝiaj rezultoj.

La hungara agrokulturo – la produktado de vegetaĵoj – staras vere sur internacia nivelo, kaj ĝiaj produktokostoj estas moderaj. Oni ne povas diri la samon pri la bredado de la bestoj – Hungario produktas tre multe da viando, sed kun tre altaj produktokostoj kaj same alta importbezono de furaĝo. Ĉar la enlanda preznivelo de nutraĵoj eĉ post la sinsekvaj prezaltigoj estas relative malalta, la agrikulturaj kooperativoj plenumas ankaŭ industrian produktadon. Tiu industria produktado ordinare – tamen ne ĉiam – ligiĝas al la prilaborado de agrikulturaj produktoj, kaj, malgraŭ tio, ke ĝi estas farata per maŝinoj malnovaj, kiujn la grandaj fabrikoj forĵetis, ĝia efikeco estas bona. Dum la 1979-a jaro 44,7% de ĉiuj enspezoj de agrikulturaj kooperativoj kaj ŝtataj bienoj devenis el industria produktado, kaj nur 55,3% el nete agrikulturaj aktivadoj.

* * *

En Hungario funkcias tre multaj malgrandaj vendejoj kaj restoracioj, kiujn grandaj ŝtataj komercaj entreprenoj – pro siaj grandaj ĝeneralaj kostoj – povis funkciigi nur kun deficito. Tiu deficito – eĉ se ne-rekte – devis esti pagata el la ŝtata buĝeto. Ĝuste por malpliigi la tiaspecajn elspezojn de la ŝtata buĝeto, lastatempe oni decidis luigi tiajn vendejojn kaj restoraciojn al privatuloj, kiuj posedas la necesan kvalifikitecon por tia laboro.

Oni vaste konigis la liston de la luigotaj vendejoj kaj restoracioj, kaj ĉiuj konkurantoj rajtis fari sian oferton de luprezo. La lu-rajton oni aljuĝis al tiu konkuranto, kiu proponis la plej altan luprezon.

La koncernaj vendejoj kaj restoracioj restas en ŝtata posedo, tamen dum la lu-periodo (senlime longigebla) la luanto havas praktike plenan disponrajton pri la nombro de dungitoj, formoj de funkciigo ktp. Oni atendas, ke tiu aranĝo alportos du avantaĝojn: unuflanke la ŝtato ne nur liberiĝos disde deficitaj vendejoj, sed eĉ ricevos certan profiton per la luprezoj, kaj aliflanke, la luantoj, kies enspezoj rekte kaj tute dependos de la priservado de la publiko, klopodos altigi la nivelon de tiu priservado.

* * *

Dum la lastaj dek monatoj „naskiĝis" en Hungario preskaŭ cent „novaj" entreprenoj: la unuan fojon dum la lastaj du jardekoj kreskis ties nombro. Kiel? Ĉu en la epoko de bremsata investo-politiko oni konstruis cent novajn fabrikojn? Tute ne: temas pri disduiĝo, distriiĝo ktp. de entreprenoj, kiuj superas la optimuman grandecon.

Tiu decido de la hungara ekonomia politiko deziras likvidi tiun pensmanieron, kiu la epitetojn „granda" kaj „moderna" komprenis sinonimoj, kaj akcelis la koncentriĝon de la hungara industrio ankaŭ tiam, se ekonomiaj vidpunktoj tute ne necesigis tion. De la nunaj disduiĝoj, distriiĝoj oni atendas pli elaste funkciantajn produktounuojn.

* * *

Dum la lasta jardeko la plej granda plago por la hungara ekonomio estis la disproporcio inter la prezaltiĝo de la tradiciaj eksportvaroj kaj importvaroj. Inter 1972 kaj 1978 tiu disproporcio atingis meze 20%, sed ĉe kelkaj varoj multe pli. Ekz. antaŭ naŭ jaroj por unu tuno da tritiko eblis aĉeti tri tunojn da nafto, kaj jam en 1978 apenaŭ nur unu tunon. El kruda bovviando ni devas liveri kvinoble pli por unu tuno da nafto, ol antaŭ naŭ jaroj.

La kresko de tiu disproporcio de jaro al jaro englutas ĉ. 10% de la nacia enspezo. Malpliigi (ne tute likvidi) tiun perdon oni povos per ŝpara uzado de krudmaterialoj kaj energio, altigo de la produktiveco de laboro, kaj elasta restrukturigo de la produktataj

kaj eksportataj varoj. La sesa kvinjara plano (1981–1985) estis koncepta konvene al tiuj postuloj.

* * *

Dum la sepdekaj jaroj la hungara ekstera komerco akumulis sufiĉe grandan deficiton – aparte ĝene altiĝis deficito en okcidentaj valutoj (tio tamen ne ĉiam devenas nur el komerco kun kapitalismaj landoj, ja ankaŭ certa parto de la komerco inter socialismaj landoj estas kalkulata en okcidenta valuto). Jen, la ciferoj de la lastaj kvin jaroj (en mil milionoj da forintoj; unue staras la tuta deficito, interkrampe tiu en okcidentaj valutoj):

1976 –– 25,3 (17,7);
1977 –– 38,7 (25,4);
1978 –– 60,2 (44,8);
1979 –– 26,8 (13,2);
1980 –– 18,9 (3,3)

La atentinda malpliiĝo dum la lasta jaro donas esperon pri tio, kè post ne tro longa tempo la hungara komerca bilanco povos ekvilibriĝi, tamen, oni devas noti, ke dum 1980 la industria produktado praktike stagnis, kaj la pliboniĝo de la bilanco sekvis unuavice el la reduktiĝo de importo, kaj nur duavice el la kresko de eksporto.

* * *

La unuaj ses monatoj de la nuna jaro alportis atentindajn rezultojn en la efektivigo de la ekonomiaj planoj de la lando, kiuj celas ĉefe la kreon de harmonio inter la produktado kaj pagipova bezono, kaj la ekvilibrigon de la importo kaj eksporto, samtempe konservante la jam atingitan vivnivelon de la loĝantaro.

Kompare al la sama periodo de la pasinta jaro la industria produktado kreskis je 2%, la produktiveco de la laboro je 4%. La vendado (en kaj eksterlanda) de industriaj varoj kreskis iom pli rapide ol la produktado mem. La investa aktiveco – konforme al la planoj – malkreskis je 5%: la plej multaj rimedoj estis uzitaj por fini pli frue komencitajn investaĵojn. La eksporto kreskis je 8%, la importo je 3%. La ampleksiĝo de la eksporto devenas ĉefe el la eksterlanda vendado de agrikulturaj produktaĵoj.

La enspezoj de la loĝantaro kreskis je 6,6%, iom pli, ol planite. La reznivelo altiĝis je 3,8%. La enlanda konsumado iom superas la planitan: tiu fakto havas parte pozitivan, parte negativan signifon.

V. B.

Sojofabo – gajnita por la homo

Sojofabo estas unu el tiuj vegetaĵoj, kiuj enhavas la plej multajn valorajn ingrediencojn por la nutrado de homoj. Iuj prognozoj diras, ke en la jaro 1985 la mondo produktos jam 100 milionojn da tunoj da sojofabo, tamen nur ĉ. 2 procentoj de tiu kvanto estos uzata por homa nutrado – la ceteron formanĝos bestoj. Kial? Nu, ĉar sojofabo krom siaj ŝatindaj proprajoj havas ankaŭ ecojn maltaŭgigajn: ĝi havas amaran guston kaj malagrablan odoron. Ekzistas tradiciaj teknologioj, per kiuj oni povas forigi tiujn odoron kaj guston, sed dum la forigado grave damaĝiĝas la albumino de la sojofabo, kaj aliaj valoraj ingrediencoj praktike likvidiĝas. Ĉu do indas utiligi sojofabon por homoj?

Nun, lastatempe, dilemo ŝajne solviĝis. Juan János *Tóth* (hungara-argentina civitano) kaj aŭstra grupo de nutraĵ-kemiistoj ellaboris la principon kaj teknologion de „bio-kataliza", malvarma prilaborado de sojofabo: per tiu teknologio eblas forigi ĉiujn ĝiajn malbonajn ecojn, sen la plej eta damaĝo al la valoraj ingrediencoj. Aparte alloga trajto de tiu ĉi teknologio estas, ke ĝiaj kostoj ne atingas tiujn de la tradiciaj prilaboraj teknologioj.

La „bío-kataliza" prilaboro ebligas produktadon de nutraĵ-bazmaterialo, kiu uzeblas por ĉ. 150 diversaj nutraĵspecoj. En Budapeŝto oni jam vendas panon, kiu enhavas 20 procentojn da „bio-katalize" prilaborita sojofabo-faruno – kun granda sukceso. (La aŭtoro de tiu ĉi artikolo povas konfirmi, ke ĝi enhavas nenian ĝenan guston aŭ odoron.)

Hungaraj firmaoj pri ekstera komerco jam komencis intertraktojn kun eksterlandaj entreprenoj pri eksporto. Oni decidis ne vendi la teknologion, sed proponi por aĉeto nur Hungarlande produktitan koncentraĵon, kiun bakistoj povas uzi sen plia prilaboro por pano kaj diversaj kukoj. En la nuna epoko, kiam la biologie ĝusta nutrado estas en la fokuso de interesiĝo en ĉiuj evoluintaj landoj, tiu eksporto probable povos atingi grandajn dimensiojn.

V.B.

Ĵurnalistoj gustumas diversajn manĝaĵojn, faritajn per bio-katalize gajnita sojo-plasto





La Historia Muzeo en la suda parto de la Burgo



Parto de la Burgo

Ervin Fenyvesi

Murmureto inter muregoj

La Burgo de Buda

Super la majesta Danubo kvazaŭ sur alta podio tage-nokte helas la muregoj de la Burgo, kiuj ĉirkaŭfermas tutan kvartalon: alia mondo, postrestinta enklavo, meze de dumiliona metropolo.

Ĉu flustri, ĉu murmureti pri la kvartalo pli historia ol arta, laŭ stiloj de la muroj pli miksa ol proprastila – kaj se oni promenas interne, forte meditiga, eble multe pli ol nun vidinda. La kvartalo sur la alta teraso prezentas sin prefere al tiuj, kiuj emas kapti „la spiriton de la loko", kaj ne nur al la gvidlibrojn foliumantoj, al la alineojn precize, sed la veran atmosferon malpli senteme observantaj vizitantoj. Kiu deziras *nur rigardi,* faros plej bone kaptante por si la panoramon, tiun vastan al Danubo, kiu troviĝas ĉemane, tuj antaŭ la Fiŝista Bastiono.

Ne nur libroj, ankaŭ lokoj havas sian faton. Iam gentoj iris kaj venis, atakis kaj fuĝis, aŭ „simple" ekzistis tra generacioj, kiuj nun eĉ de arkeologoj ne estas jam troveblaj. Murmuretas vere la muretoj, trovitaj profunde brulintaj kaj kovritaj de cindroj: nigriĝintaj fostoj kaj ostoj balbutas pri sorto de la vilaĝo: apude krias la spuroj de la detruintaj *tataroj.* Ofte ŝanĝiĝis la loĝantoj de tiu alta podio, ankaŭ post tiu neniiĝo antaŭ okcent jaroj. La cindrojn kovras jam plankoj de domoj de la poste alvenintoj, kiuj eble rapide kreis la urbon ĉirkaŭmuritan por kontraŭstari novan invadon. Hungaroj kaj alilandanoj ligis siajn nestojn al la monteto, probable tuj apud la malgranda fortikaĵo de la reĝo, kiu tri jarcentojn post fondo de la hungara ŝtato igis Buda-burgon reĝa rezidejo. Pluaj tri jarcentoj sekvis kun helaj kaj malpli helaj periodoj, tamen Buda, la Burgo, iĝis pli kaj pli brila, la Palaco de l' reĝo pli pompa.

Daŭre venis diversaj ondoj de enloĝantoj: hungaroj kaj germanoj, francoj kaj italoj, inter la novaj urbanoj ree metiistoj, komercistoj, senditoj de eksterlandaj firmaoj por tie krei negocan filion. El Burgundio *kavaliro Bertrandon* en 1433 traveturante eĉ ne interpretiston bezonis. Abunde li renkontis „france parolantajn judojn – li raportis –, inter ili kuracistojn kaj muzikistojn, kiuj estis forpelitaj el Francujo."

La urbo formiĝis diverslingva, la opaj gentoj en apartaj stratoj klopodis izoli sin. La apartaj preĝejoj plenumis ankaŭ la tiam kutimajn publikajn funkciojn, tiujn de klubejoj, negocejoj, lernejoj. Tra jarcento akre kverelis du eklezioj, parokioj de la Burga urbo, de la hungaroj kaj de la germanoj. Kontraŭstarigis ilin la lukto por la urba potenco, kiu ebligis gravajn ekonomiajn avantaĝojn al la flanko de la potenculoj. La procesaj argumentoj troviĝis jen en la monpruntoj al la reĝo, jen sur la klaboj de la samgentanoj, kiujn la riĉaj moŝtoj mobilizis kontraŭ la konkurenco.

Dum regado de Matiaso Korvin, la itala renesanco igis kolora la monteton, kaj komprenu tion ankaŭ laŭ la abunde starigitaj ruĝmarmoraj fasadoj. Italoj venis, kvazaŭ kun la nova stilo, krom humanistoj-scienculoj ŝtonĉizistoj kaj skulptistoj, el Francujo cizelistoj, aktoroj kaj multaj aliaj en la tiam riĉan landon, en la ĉefurbon, Buda-burgon. Kun ili senĝenaj, sed ĝentilaj kavaliroj, ŝaŭmo de la feŭda mondo, kiujn nuntempe oni mencius „posten-serĉantoj sur la kortega labormerkato".

Ne imagu tute trankvila la atmosferon de la Burgo: la privilegiitaj korteganoj, kaj la ceteraj urbanoj volonte ĉikanis unu la alian. *Amerigo Vespucci* – antaŭ siaj vojaĝoj al la Nova Mondo – ricevis timplenan leteron de sia frato, laboranta ĉe la konstruata Burga akvokondukilo: „Se la reĝo mortos, ni italoj en Buda ĉu pereos?" Ne mankis la Mezepokon karakterizantaj noktaj dueloj, postkverelaj mortigoj; la atakita kortegano foje sukcesis fuĝi en la Palacon... estas legebla en kronikoj.

Dum la turka okupo – de 1541 – Buda transformiĝis je islama urbo, en kiu kristanoj estis nur la Balkanon forlasintaj, de tie fuĝintaj sudslavoj kaj grekoj. Kaj kiam post tri duonjarcentoj – en 1686 – la urbon sieĝantoj finfine venkas, Buda prezentiĝas kiel „militpredo" por la germanaj kaj kroataj trupoj, kiuj en ĝi ekrezidas. Tiel ordonis la Viena supera militstabo, kiu cetere proponis ĝin enloĝigi per (nur) germanoj kaj katolikoj, eble en la periferio povos loĝi serboj kaj hungaroj...

El la „okcidenta bastiono de l' islamo" fariĝis urbeto de Germaniaj enloĝantoj, provinca bastiono de la okupanta fremdlando, fremda korpo

Ŝildo de la iama hotelo „Ruĝa Erinaco"

La Tutlanda Arĥivo (en la fono)



Moderna konstruaĵo, harmonianta kun la historia medio
(Fotoj de Z. Fejér)

en ribeli-preta lando. La turka *Budun* transformiĝis germana *„stadt Ofen"*. Sub la banala, provincmaniera barokvesto malaperis la iama klara gotiko, dum la detruaj bataloj neniiĝis la renesanca pompo. Kelkaj gotikaj sidniĉoj ie-tie en domaj enirejoj, foje koridoraj pordoj memorigis mizere pri la antaŭturkaj fieraj tempoj.

La Burg-kvartalo longe restis kun sia Aŭstra karaktero, kun burĝaj domoj de malfrua baroko, kun ties rokoko kaj „bidermejer" variantoj. La ŝtataj konstruaĵoj imponis per la imperia uniformeco devena de Vieno; apenaŭ tuŝis nova hungara arkitekturo la domaron. Tiu germaneca Buda ruiniĝis en 1944–45, pro la prudenton perdinta, mania nazia, germana „defendo".

Desub la rompiĝintaj tegmentoj, la aerpremoj frakasis fasadojn kaj murojn, pluvece falis de ĉie mortero. Malantaŭ ĉio ĉi surlumen aperis, en iamaj formoj manifestis sin la eroj de la periodoj antaŭ germanoj kaj turkoj, pri kiuj oni iom sciis, prefere fidis ke ili ekzistis, ol esperis vere trovi ilin. Evidentiĝis, malgraŭ ĉia kontraŭspekulado de la historiistoj kaj arthistoriistoj: la enloĝantoj de ĉiuj periodoj gardis la antaŭajn murojn, samkiel la urbestraro kaj reĝoj la muregojn; kio okazis ne pro ia entuziasmo por la „monumentoj", sed simple pro la komenca malriĉo: plej unue tegmenton levi, neston konstrui por si, por la familio, kaj tiucele uzi, utiligi, kapti ĉion kapteblan kaj utiligeblan. Tiel kompleksiĝis dum la tempoj, en la historia daŭro, eĉ tutaj – por ni – monumentokolektoj, en kelkaj domoj de la Burg-kvartalo: ties sekretojn *desub* la kovraĵo, la mortero kaj postaj muroj, eligis la lasta sieĝo, eble kiel aldonan premion al la liberigo *desub* la faŝisma kovraĵo.

(*Daŭrigota*)

ĈIU PECO MARKAĴO!

NÉPMŰVÉSZETI·ÉS·HÁZIIPARI·VÁLLALAT

servo por klientoj:
184-697

Ni ofertas
aron da unikaj
popolartaj varoj
en-niaj 80
vendejoj

Printempe de tiu ĉi jaro forpasis János Pilinszky, unu el la plej potencaj figuroj de la moderna hungara liriko. Lian poezion karakterizas profunda intelekteco, puritana lingvaĵo kaj konciza esprimmaniero, kiu ofte signifas kvazaŭ nevenkeblan baron por tradukistoj. Li estis firma katoliko, kaj tiu aparteno multe influis ankaŭ lian poezion.
Apokrifo *estas unu el la ĉefaj poemoj de Pilinszky, kaj ĝi okupas elstaran lokon ankaŭ en la tuta hungara literaturo. Ĝi kreiĝis en la jaro 1954, kaj alfrontas kvazaŭ la tuton de la homa ekzistado; ni esperas, ke la traduko sukcesas peri la grandiozajn pensojn kaj la simplisme-komplikajn formajn riĉaĵojn de la grandioza poemo.*

János Pilinszky

APOKRIFO

1

Ĉar forlasatos tiam ĉio ajn.

Disiĝos la silento de l' ĉieloj,
de l' teroj povraj ĉe la mondekstrem',
kaj por eterno tiu de l' hundejoj.
Fuĝanta bird-armeo en l' aer'.
Kaj jen aperos la sundisk' ascenda,
pli muta ol pupil' freneza kaj
trankvila kiel sovaĝbest' atenta.

Sed maldormante en la ekziliĝ',
ĉar dormi tiun nokton mi ne povos,
mi ĵetiĝados kiel noktatempe
la arbo milfolia, kaj parolos:

Ĉu estas la defil' al vi konata,
la marŝ' de l' jaroj tra l' kampar' ĉifita?
Ĉu vi komprenas de l' forpas' la faltojn
sur tiu ĉi mandorso plenĉizita?
Ĉu scias vi la nomon de l' orfeco?
Kaj ĉu vi scias, kiom el sufer'
tretadas fendithufe, palmoplande
l' eternan nigron de l' ĉi suba sfer'?
La nokto, la malvarmo, la fosaĵo,
la karcerano-kap' oblikviganta,
la frostaj trogoj, ĉu konatas al vi
la monda fundo de l' dolor' giganta?
La sun' leviĝis. En subruĝ' kolera
el verge sveltaj arboj krad' malhela.

Tiel mi startos. Frunte al pereo
senvoĉe iu hom' paŝadas.
Nenion havas, ombron havas.
Bastonon kaj kaptitkostumon havas.

2

Tial mi lernis iri! Por ĉi lacaj
malfruaj paŝoj penaj kaj agacaj.

Kaj jen vesperos, kaj min enŝtonigos
kun kot' la nokto, kaj mi subpalpebre
gardados plu la marŝon, la vergetojn
de l' arbetar' flamanta febre.
La ardan, etan boskon po folioj.
Ĉi tie la Edeno staris iam.
En duondorm' doloro noviĝanta:
mi aŭdas arbkolosojn ĝiajn!



Mi volis fine hejmen, hejmen kiel
en la Biblio venis tiu homo.
Mia monstrega ombro sur la kort'.
Kaduka mut', maljuna par' en domo.
Kaj venas jam, min vokas, kaj jam ploras
la kompatindaj, brakas min faletaj.
Alprenas min la praa ord'.
Mi ekkubutas sur la steloj ventaj –

Se eblus trakti nur ĉi solan fojon
kun vi, amita! Jarojn fore,
sed mi ne lacis diri, kion
infan' al baril-fendo plore,
l' esperon preskaŭ jam sen spir',
ke mi vin trovos post foresto.
Proksimo via pulsas miagorĝe.
Mi malkvietas kiel sovaĝbesto.

Viajn vorterojn, la parolon homan
mi ne parolas. Vivas aro birda,
kiuj kun hast' korkreva nun rifuĝas
sub firmament', sub ĉielvolbo arda.
En flama kamp' pikitaj latoj orfaj,
kaj kaĝoj, kiuj senmoviĝe brulas.
Mi ne komprenas la parolon homan,
kaj vian idiomon ne parolas.
Pli senpatrujas mia vort' ol vorto!
Mi eĉ senvortas.

Ĝia ŝarĝ' terura
kaskadas suben tra l' aer',
sonadas ia trunko tura.

Ĉu vi? Nenie. Kiom da malplen'.
Seĝ', ripozlit' lasitaj en ĝarden'.
Sur ŝtonoeĝoj mia ombro tintas.
Mi lacas. El la tero mi elpintas.

3

Min vidas Dio stari sub la sun'.
Ĉi ombron sur pavimo kaj palisoj.
Senspiran ombron vidas stari li
en prem' de senaeraj ĉi kulisoj.

Tiam mi estas jam kiel la ŝton';
senviva sulk', grafik' el mil gravuroj,
plenman' da eriĝinta rub'
tiame la vizaĝ' de l' kreaturoj.

Kaj vic de larmoj fra e' taŭzitaj trajtoj
nur fluas, fluas la malplenaj falfoj.

El la hungara: Adalberto Huleŝ

(Rim.: kreaturo (lat. creatura): kreitaĵo)

Tutmonda Sonoro aperis!

Kálmán Kalocsay (1891-1976)
(Foto de Z. Fejér)

Se oni povas fidi la promeson de hungaraj presistoj, proksimume samtempe kun tiu ĉi numero de HV aperas en du binditaj volumoj, sur 670 paĝoj **Tutmonda Sonoro,** *la grandioza tradukita poemaro de K. Kalocsay. Ĉi-sube oni trovas ne nur specimenojn el la granda verko, sed ankaŭ imponan ekzemplon de la persisto, kun kiu li strebis al perfekteco: la faman poemon de Sapfo li tradukis kvinfoje.*

La libro kostas 66,– guldenojn, kaj oni povas mendi ĝin ĉe ĉiuj libroservoj. Jen, ĝiaj bibliografiaj indikoj:

Kálmán Kalocsay: Tutmonda Sonoro 1-2. VIII plus 664 p. 20 cm. Bindita. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1981. ISBN (por la tuta verko) 963 571 077 1; (por la unua volumo) 963 571 091 7; (por la dua volumo) 963 571 092 5.

Sapfo:

Amkonfeso

1

Ho, feliĉa vir', egalanta diojn,
kiu en proksim' via povas sidi
kaj aŭskulti vin: la parolon freŝan,
ridon arĝentan.

Kaptas min korprem', se mi vin ekvidas,
via dolĉa kap' se aperas brile,
lamas mia lang', ne kapablas lipoj
vorton eldiri.

Mi paliĝas kaj tra la korp' fajreroj
kuras; brulas mi de sopir: sovaĝa,
turnas min la kap', la okuloj vibras,
muĝas oreloj.

Ŝvit' malvarma sur mia trema korpo
gutas. Ve, vizaĝ' mia velkas kiel
herb' aŭtuna. Kaj pro dolor' langvora
svene mi falas.

2

Feliĉega vir', egalul' de dioj
ŝajnas, kiu vin ĉe la flank' admiri
povas kaj apude sidante aŭdas
dolĉe babili,

sorĉe ridi. Ve, kia bat' en koro,
kiam vin mi nur minutete vidas,
sufokiĝas al mi la voĉ', la lango
lame rigidas

eĉ balbuti kaj delikate vibraj
fajroj glite sub mia haŭto kuras,
mia vid' nebulas, oreloj miaj
surde susuras.

Mia tuta korpo komencas tremi,
kaj mi estas jam, baniĝante ŝvite,
verda pli ol herbo, mi preskaŭ ŝajnas
morti subite...

3

Plej feliĉa vir', egalul' de dioj
al mi ŝajnas, kiu sidiĝi povas
vidalvide al vi kaj el proksimo
aŭdi la dolĉe

freŝan voĉon kaj la magian ridon,
kiu fandas en mia brust' la koron.
Se nur por moment' mi vin alrigardas,
tuj sufokiĝas

mia voĉ', la lango lamiĝas, fajroj
delikataj sub mia haŭto kuras,
obskuriĝas al mi la vido, muĝas
miaj oreloj.

Min inundas ŝvito, la tutan korpon
kaptas al mi tremo, mi estas verda
pli ol herbo, multe ne mankas jam, ke
morta mi ŝajnu...

4

Dio ŝajnas al mi la vir' feliĉa,
kiu povas longe vin amadmiri
kontraŭ vi sidante, vin aŭskultante
freŝe babili,

dolĉe ridi, Ve, kia bat' en koro,
kiam vin mi nur minutete vidas,
sufokiĝas en mi la voĉ', la lango
lame rigidas

eĉ balbuti, kaj delikataj fajroj
kuras vibre sub mia haŭt', mi brulas,
turnas min vertiĝ', la oreloj muĝas,
vido nebulas.

Ŝvito frida sur mia korpo fluas,
tremo kaptas min, la vizaĝ' pli palas
ol l' aŭtuna herb', oni kredus jam, ke
morte mi falas...

5

Plej feliĉa vir', egalul' de dioj
al mi ŝajnas, kiu sidiĝi povas
vidalvide al vi kaj aŭdi el pro-
ksimo la dolĉe

freŝan voĉon kaj la magian ridon,
kiu fandas en mia brust' la koron.
Se nur por moment' mi vin alrigardas,
tuj sufokiĝas

mia voĉ', la lango lamiĝas, fajroj
delikataj sub mia haŭto kuras,
mi ne vidas per la okuloj, muĝas
miaj oreloj.

Min inundas ŝvito, la tutan korpon
kaptas al mi tremo, mi verdas pli ol
herbo, kaj kun mank' apenaŭa ŝajnas
jam, ke mi mortas...

Printempe de tiu ĉi jaro forpasis János Pilinszky, unu el la plej potencaj figuroj de la moderna hungara liriko. Lian poezion karakterizas profunda intelekteco, puritana lingvaĵo kaj konciza esprimmaniero, kiu ofte signifas kvazaŭ nevenkeblan baron por tradukistoj. Li estis firma katoliko, kaj tiu aparteno multe influis ankaŭ lian poezion.
Apokrifo *estas unu el la ĉefaj poemoj de Pilinszky, kaj ĝi okupas elstaran lokon ankaŭ en la tuta hungara literaturo. Ĝi kreiĝis en la jaro 1954, kaj alfrontas kvazaŭ la tuton de la homa ekzistado; ni esperas, ke la traduko sukcesas peri la grandiozajn pensojn kaj la simplisme-komplikajn formajn riĉaĵojn de la grandioza poemo.*

János Pilinszky

APOKRIFO

1

Ĉar forlasatos tiam ĉio ajn.

Disiĝos la silento de l' ĉieloj,
de l' teroj povraj ĉe la mondekstrem',
kaj por eterno tiu de l' hundejoj.
Fuĝanta bird-armeo en l' aer'.
Kaj jen aperos la sundisk' ascenda,
pli muta ol pupil' freneza kaj
trankvila kiel sovaĝbest' atenta.

Sed maldormante en la ekziliĝ',
ĉar dormi tiun nokton mi ne povos,
mi ĵetiĝados kiel noktatempe
la arbo milfolia, kaj parolos:

Ĉu estas la defil' al vi konata,
la marŝ' de l' jaroj tra l' kampar' ĉifita?
Ĉu vi komprenas de l' forpas' la faltojn
sur tiu ĉi mandorso plenĉizita?
Ĉu scias vi la nomon de l' orfeco?
Kaj ĉu vi scias, kiom el sufer'
tretadas fendithufe, palmoplande
l' eternan nigron de l' ĉi suba sfer'?
La nokto, la malvarmo, la fosaĵo,
la karcerano-kap' oblikviganta,
la frostaj trogoj, ĉu konatas al vi
la monda fundo de l' dolor' giganta?
La sun' leviĝis. En subruĝ' kolera
el verge sveltaj arboj krad' malhela.

Tiel mi startos. Frunte al pereo
senvoĉe iu hom' paŝadas.
Nenion havas, ombron havas.
Bastonon kaj kaptitkostumon havas.

2

Tial mi lernis iri! Por ĉi lacaj
malfruaj paŝoj penaj kaj agacaj.

Kaj jen vesperos, kaj min enŝtonigos
kun kot' la nokto, kaj mi subpalpebre
gardados plu la marŝon, la vergetojn
de l' arbetar' flamanta febre.
La ardan, etan boskon po folioj.
Ĉi tie la Edeno staris iam.
En duondorm' doloro noviĝanta:
mi aŭdas arbkolosojn ĝiajn!



Mi volis fine hejmen, hejmen kiel
en la Biblio venis tiu homo.
Mia monstrega ombro sur la kort'.
Kaduka mut', maljuna par' en domo.
Kaj venas jam, min vokas, kaj jam ploras
la kompatindaj, brakas min faletaj.
Alprenas min la praa ord'.
Mi ekkubutas sur la steloj ventaj –

Se eblus trakti nur ĉi solan fojon
kun vi, amita! Jarojn fore,
sed mi ne lacis diri, kion
infan' al baril-fendo plore,
l' esperon preskaŭ jam sen spir',
ke mi vin trovos post foresto.
Proksimo via pulsas miagorĝe.
Mi malkvietas kiel sovaĝbesto.

Viajn vorterojn, la parolon homan
mi ne parolas. Vivas aro birda,
kiuj kun hast' korkreva nun rifuĝas
sub firmament', sub ĉielvolbo arda.
En flama kamp' pikitaj latoj orfaj,
kaj kaĝoj, kiuj senmoviĝe brulas.
Mi ne komprenas la parolon homan,
kaj vian idiomon ne parolas.
Pli senpatrujas mia vort' ol vorto!
Mi eĉ senvortas.

Ĝia ŝarĝ' terura
kaskadas suben tra l' aer',
sonadas ia trunko tura.

Ĉu vi? Nenie. Kiom da malplen'.
Seĝ', ripozlit' lasitaj en ĝarden'.
Sur ŝtonoeĝoj mia ombro tintas.
Mi lacas. El la tero mi elpintas.

3

Min vidas Dio stari sub la sun'.
Ĉi ombron sur pavimo kaj palisoj.
Senspiran ombron vidas stari li
en prem' de senaeraj ĉi kulisoj.

Tiam mi estas jam kiel la ŝton';
senviva sulk', grafik' el mil gravuroj,
plenman' da eriĝinta rub'
tiame la vizaĝ' de l' kreaturoj.

Kaj vic de larmoj fra e' taŭzitaj trajtoj
nur fluas, fluas la malplenaj falfoj.

El la hungara: Adalberto Huleŝ

(Rim.: kreaturo (lat. creatura): kreitaĵo)

Tutmonda Sonoro aperis!

Kálmán Kalocsay (1891-1976)
(Foto de Z. Fejér)

Se oni povas fidi la promeson de hungaraj presistoj, proksimume samtempe kun tiu ĉi numero de HV aperas en du binditaj volumoj, sur 670 paĝoj **Tutmonda Sonoro,** *la grandioza tradukita poemaro de K. Kalocsay. Ĉi-sube oni trovas ne nur specimenojn el la granda verko, sed ankaŭ imponan ekzemplon de la persisto, kun kiu li strebis al perfekteco: la faman poemon de Sapfo li tradukis kvinfoje.*

La libro kostas 66,– guldenojn, kaj oni povas mendi ĝin ĉe ĉiuj libroservoj. Jen, ĝiaj bibliografiaj indikoj:

Kálmán Kalocsay: Tutmonda Sonoro 1-2. VIII plus 664 p. 20 cm. Bindita. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1981. ISBN (por la tuta verko) 963 571 077 1; (por la unua volumo) 963 571 091 7; (por la dua volumo) 963 571 092 5.

Sapfo:

Amkonfeso

1

Ho, feliĉa vir', egalanta diojn,
kiu en proksim' via povas sidi
kaj aŭskulti vin: la parolon freŝan,
ridon arĝentan.

Kaptas min korprem', se mi vin ekvidas,
via dolĉa kap' se aperas brile,
lamas mia lang', ne kapablas lipoj
vorton eldiri.

Mi paliĝas kaj tra la korp' fajreroj
kuras; brulas mi de sopir: sovaĝa,
turnas min la kap', la okuloj vibras,
muĝas oreloj.

Ŝvit' malvarma sur mia trema korpo
gutas. Ve, vizaĝ' mia velkas kiel
herb' aŭtuna. Kaj pro dolor' langvora
svene mi falas.

2

Feliĉega vir', egalul' de dioj
ŝajnas, kiu vin ĉe la flank' admiri
povas kaj apude sidante aŭdas
dolĉe babili,

sorĉe ridi. Ve, kia bat' en koro,
kiam vin mi nur minutete vidas,
sufokiĝas al mi la voĉ', la langoj
lame rigidas

eĉ balbuti kaj delikate vibraj
fajroj glite sub mia haŭto kuras,
mia vid' nebulas, oreloj miaj
surde susuras.

Mia tuta korpo komencas tremi,
kaj mi estas jam, baniĝante ŝvite,
verda pli ol herbo, mi preskaŭ ŝajnas
morti subite...

3

Plej feliĉa vir', egalul' de dioj
al mi ŝajnas, kiu sidiĝi povas
vidalvide al vi kaj el proksimo
aŭdi la dolĉe

freŝan voĉon kaj la magian ridon,
kiu fandas en mia brust' la koron.
Se nur por moment' mi vin alrigardas,
tuj sufokiĝas

mia voĉ', la langoj lamiĝas, fajroj
delikataj sub mia haŭto kuras,
obskuriĝas al mi la vido, muĝas
miaj oreloj.

Min inundas ŝvito, la tutan korpon
kaptas al mi tremo, mi estas verda
pli ol herbo, multe ne mankas jam, ke
morta mi ŝajnu...

4

Dio ŝajnas al mi la vir' feliĉa,
kiu povas longe vin amadmiri
kontraŭ vi sidante, vin aŭskultante
freŝe babili,

dolĉe ridi, Ve, kia bat' en koro,
kiam vin mi nur minutete vidas,
sufokiĝas en mi la voĉ', la langoj
lame rigidas

eĉ balbuti, kaj delikataj fajroj
kuras vibre sub mia haŭt', mi brulas,
turnas min vertiĝ', la oreloj muĝas,
vido nebulas.

Ŝvito frida sur mia korpo fluas,
tremo kaptas min, la vizaĝ' pli palas
ol l' aŭtuna herb', oni kredus jam, ke
morte mi falas...

5

Plej feliĉa vir', egalul' de dioj
al mi ŝajnas, kiu sidiĝi povas
vidalvide al vi kaj aŭdi el pro-
ksimo la dolĉe

freŝan voĉon kaj la magian ridon,
kiu fandas en mia brust' la koron.
Se nur por moment' mi vin alrigardas,
tuj sufokiĝas

mia voĉ', la langoj lamiĝas, fajroj
delikataj sub mia haŭto kuras,
mi ne vidas per la okuloj, muĝas
miaj oreloj.

Min inundas ŝvito, la tutan korpon
kaptas al mi tremo, mi verdas pli ol
herbo, kaj kun mank' apenaŭa ŝajnas
jam, ke mi mortas...

Kio fontos el „FONTO"?

– Pensoj pri la Esperantaj literaturaj revuoj –

Komence estis *La Revuo.* Nu, ne tute komence, sed nur preskaŭ du jardekojn post la naskiĝo de Esperanto: inter 1906 kaj 1914 ĝi aperis ĉiumonate, en 64-paĝaj kajeroj: 48 paĝoj estis dediĉitaj al literaturo, kaj 16 paĝoj al diversaj neliteraturaj publikaĵoj.

La sekva vere grandsignifa literatura revuo Esperanta estis *Literatura Mondo,* kiu aperis – kun du interrompoj – de 1922 ĝis 1949. Ĝi estis revuo pure literatura, redaktita ne nur altnivele, sed ankaŭ kun forta strebado, ke la revuo plenumu krome literatur-organizan funkcion. Tamen, tiu strebado estis sukcesa nur dum la dua periodo de la revuo (1931–1938). LM donis same grandan atenton al publikigo de originala kaj tradukita beletro, aperigante ankaŭ atentindan kritikan rubrikon.

Ĝi ĉesis en 1949, kaj ses jarojn poste, en 1955 startis eĉ du literaturaj revuoj: *La Nica Literatura Revuo* (redaktita de G. Waringhien) kaj *Norda Prismo* (redaktita de F. Szilágyi ĝis 1967, kaj poste de W. Auld). La revuo de Waringhien aperis (dumonate) ĝis 1962, en 42 po 40-paĝaj kajeroj, tiu de Szilágyi–Auld ĝis 1973, kun diversaj periodeco kaj amplekso.

El la du revuoj la pli erudicia estis nepre tiu de Waringhien: ĝi estis rendevuejo de praktike ĉiuj signifaj kreantoj de la Esperanta literaturo, sed ĝi neniam havis tiel centran rolon, kiel *Literatura Mondo.* Kaŭzo de tio estis ĉefe, ke „La Nica" ne havis libroeldonejon, tamen probable kontribuis ankaŭ la cirkonstancoj de la malvarma milito kaj subjektivaj faktoroj.

Norda Prismo dum sia Szilágyi-periodo fakte estis ne pure literatura, sed kultura revuo, kun multa – ne ĉiam tre altkvalita – ĵurnalismo. Kvalitaj problemoj montriĝis ankaŭ ĉe la aperantaj literaturaĵoj, eĉ ĉe tradukitaj verkoj: ofte oni povis legi tradukitajn poemojn kaj novelojn de sesaklasaj nacilingvaj aŭtoroj. Szilágyi iomete ignoris la propre Esperantan kulturon – pri ĝi aperis tre malmultaj kontribuaĵoj en NP. Auld faris signifan ŝanĝon tiurilate, kaj NP fariĝis vera forumo de la originala Esperanta literaturo.



Efemeran vivon havis *Monda Kulturo,* kvaronjara kultura revuo de UEA, aperinta inter 1962–1966. Eĉ dum tiel mallonga tempo ĝi havis du periodojn: la unua redaktoro, Auld, donis gravan prioritaton al la originala literaturo, sed tio elvokis malplaĉon ĉe multaj, kaj la sekva redaktoro, la franco Albault, publikigis pli da tradukaĵoj. Sed la ŝanĝo ne pliigis la nombron de la abonantoj – kaj la revuo ĉesis.

Literatura Foiro – revuo debutinta en Italio, poste aperinta en Finnlando, kaj lastatempe venanta el Svislando – dum pli ol jardeko ne sukcesis fariĝi centra literatura revuo de Esperantujo. Tio ŝuldiĝas parte al la ne tre granda amplekso, kiu ne permesas abundan aperigon de beletra prozo, sed ankaŭ al la fakto, ke tiu ĉi revuo ne malpli povus nomi sin *interlingvistika* „Foiro".

Vera literatura revuo ŝajnas fariĝi la ĉiumonata *Fonto.* Ĝi eldoniĝas en la fora lando, Brazilo, kaj tio teorie estas fakto salutinda, sed praktike prezentas ankaŭ malavantaĝojn, pro la granda distanco inter Sud-Ameriko kaj Eŭropo, kie troviĝas la plimulto de la abonantoj. *Fonto* aperas monate, tamen ĝis la fino de junio la



marta numero estas la lasta, kiun mi ricevis. (Ĉiukaze mi konscias, ke estas iom aŭdaĉe riproĉi en HV alian revuon pro neakurata aperritmo...) *Fonto* startis en oktobro de 1980, do, laŭ la aperintaj ses numeroj jam eblas fari kelkajn konstatojn pri ĝi.

Sur la titolpaĝo de la unua numero paradas dudek nomoj de kontribuintoj: la listo estas impone internacia, kaj ankaŭ ŝatinda. Jen, kelka specimeno: G. Waringhien, H. Dresen, M. Boulton, S. Chaves, M. Kuroda ktp. Originalaj verkoj konsistigas ĉ. 60-70 procentojn de la amplekso, la proporcio de poezio kaj prozo estas 30-70 procentoj. Recenzo aperas nur unu: sub la titolo „Verko malsenvalora", verkita de Auld, pri la eseo „Pri Esperanta tradukarto" de Fernando de Diego. Tiu recenzo estas dece longa (4-paĝa) – *Fonto* deziras recenzi nur vere gravajn verkojn, sed al tiuj oni dediĉos pli grandan spacon. La recenzoj en la sekvaj numeroj temas pri „Al abelujo ĝi flugas" de J. Liiv, du detektivromanoj de J. Valano – kaj poste ŝajne mankis pliaj recenzindaj verkoj.

Ĝuste tiu manko de kritika–esperantologia rubriko estas la plej grava negativa trajto de la ĝisnunaj numeroj, kvankam la „beletra absoluteco" ankaŭ estas pravigebla, ja oni povas diri, ke necesas unue literaturo mem, kaj nur poste literaturo *pri* literaturo. La bunteco de la aperantaj beletraĵoj konjektigas, ke Auld celas per la revuo antaŭ ĉio vastan publikon, kaj deziras eviti esoteraĵojn, malsimile al *Literatura Foiro.* Krom vere valora litera-

turo aperas foje-foje ankaŭ detektivaĵoj kaj noveloj iom naivaj, kiuj normale povus havi lokon nur en porvirinaj semajnrevuoj. (Unu el tiuj estas „Budapeŝta romanco", kiu presiĝis ankaŭ en HV, tamen ne kiel literaturo, sed mi diru, turisma propagando pri Budapeŝto.) Kaj ĉu la represo de „La murdita juglandarbo" de E. Tóth, aperinta jam en HV kaj en 10 000 ekzempleroj en la legolibro „La kato en la sako", atestas pri manko de kontribuaĵoj?

Post la riproĉoj venu laŭdoj. La ĉefa pozitivaĵo de *Fonto* estas ĝia legindeco. Oni trovas en ĝi novelojn, romanfragmentojn kaj poemojn, kiuj estas facile kaj plezure legeblaj por ĉiuj homoj, kiuj scias Esperanton, eĉ se ili ne havas aparte altan literaturan edukitecon. Tiu aspekto estas tre grava, ĉar tiamaniere *Fonto* povas havi la ŝancon reakiri por la Esperanta literaturo tiun publikon, kiu post la lasta „ora epoko" de la kvindekaj jaroj ŝajne forlasis ĝin. Ĉu estos tiel? Oni vidos!

Por tio tamen necesas, ke la dukolore presitaj, populare (foje-foje eĉ iom tro populare) ilustritaj kajeroj atingu iom pli akurate Eŭropon, kaj trovu vojon al vere multaj esperantistoj. Iam *Norda Prismo* havis trimil abonantojn. Ĉu *Fonto* atingos tion? Espereble. Sed se la kurza renesanco de la dolaro ne baldaŭ haltos, ankaŭ la 15 dolara jarabono hezitigos ne malmultajn abonontojn.

Vilmos *Benczik*

Endre Tóth (1931–1981) estis unu el la plej grandaj promesoj de la originala Esperanta prozo. Li debutis meze de la sepdekaj jaroj, jam ne tre juna, kaj li gajnis plurajn gravajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. Pluraj noveloj liaj aperis ankaŭ sur la paĝoj de HV: Lappar, la Antikristo *(1976/6),* La murdita juglandarbo *(1978/2),* Pordoj *(1980/1). Liaj kolektitaj noveloj sub titolo* Lappar, la Antikristo *aperos espereble ankoraŭ ĉi-jare ĉe Hungara Esperanto-Asocio. Diference de la suba krimrakonto – kiu cetere estas lia lasta verko – la novelojn de la volumo plejparte karakterizas profunda intelekteco kaj speco de groteska ironio kaj riproĉa amaro. Endre Tóth vidis kaj priskribis la mondon kaj la homojn precize tiaj, kiaj ili estas efektive Li estis blindulo.*

Endre Tóth

PATO

La kuracista interkonsiliĝo finiĝis. Sinjoro Vojt, kaj la malgrandstatura familia kuracisto akompanis la profesorojn tute ĝis la krada ĝardenpordego. Poste ili returniĝis al la domo.

– Nu? – demandis Vojt la malgrandulon.

– Jes – li respondis – kio estas home ebla... laŭ la nuntempa situacio de la sciencoj... tio estas bedaŭrinde... – dume ili atingis la domon.

Vojt kondukis la kuracistón en la manĝoĉambron, kaj malpacience proponis al li sidlokon.

– ...nu – daŭrigis la doktoro –, ni estas senpovaj – kaj li faris nervozan geston. – Mi petas vin, estu forta, la situacio de via estimata edzino... nu jes, boniĝo – neesperebla. Eĥ... La stato de la kruroj... supozeble... ĝis la tuta paraliziĝo, kaj laŭ la spertoj de la scienco, la malsano disvastiĝos al la brakoj kaj la manoj, kaj ankaŭ ili fariĝos neuzeblaj.

La sciigo atingis sinjoron Vojt tute neatendite.

– Tamen, sinjoro doktoro – li ekparolis – kion vi rekomendas? Ĉu tute vanas ia ajn kuracado?

– Ni devas fari almenaŭ la ŝajnon de iaspeca kuracado, pro la psika stato de la malsanulino. Ŝi devas senti, ke ni ne ĉesis esperi. Kaj poste, iom post iom, per iaspeca ruza maniero, ni devos konsciigi... nu konsciigi ŝin pri la afero. Cetere, via estimata edzino estas tute sana. Ne parolante pri tiuj teruraĵoj. Ŝi povos ĝisvivi la plej grandan homan aĝon. Nu, certe en situacio tute ne enviinda... tio estas ĉio, kion mi povas diri.

La kuracisto stariĝis, kaj adiaŭis. Sinjoro Vojt akompanis lin ĝis la ĝardenpordego, kaj longe postrigardis lin.

– Ĝis la plej granda homa aĝo – li ripetis pense – estus bele – kaj kun teruro li memoris pri la lastaj ses jaroj, kiujn li devis travivi, tolerante la tiranajn kapricojn de sia edzino.

Poste li reiris en la ĉambron de la virino. Estis iom surprize, ke la virino ne tre interesiĝis pri la rezultoj de la interkonsiliĝo. Ŝi sidis en granda fotelo, al kies brakoj estis apogitaj ŝiaj bastonoj. Ŝi estis droninta en ia libro, kaj estis tute indiferenta, kiel lastatempe ĉiam.

– Mi bedaŭras, mia kara – diris al ŝi Vojt –, sed hodiaŭ vespere mi devus eliri. Sufiĉe maloportune, ĉar restos neniu en la domo. Ĉu vi pensas, ke eble...

– Ne, ne – interrompis Kornelia – iru trankvile, se vi havas aferon. Mi jam devas kuŝiĝi.

– Bone. Mi atendos, ĝis kiam vi estos en lito, mi havas rendevuon kun Simono je la naŭa, mi atingos lin dum kvaronhoro. Mi havas ankoraŭ tempon. Nun mi iras en la alian ĉambron por fari ordon.

Li lasis Kornelian sola. Li malamegis vidi, kiel malleite baraktante lamadas Kornelia kun la bastonoj, kaj neniam akceptas helpon.

En la halo Vojt komencis labori. El la ŝranko li serĉis la longan fadenon kaŝitan tie, kaj ĉe ĝia ekstremo li faris maŝon. La maŝon li metis al la klinko de la ĉefa gasfermilo, kiu en fermita stato staris horizontale. Poste li levis la ŝnuron, suprenĵetite li kondukis ĝin

super la ŝranko, ĝis la pordo. Starante sur seĝon, tra la supra ventuma fenestro li ĵetis eksteren la finon de la fadeno. Singardeme li malfermis la pordon. La fino de la ŝnuro flirtis ekstere en la milda aŭtuna venteto. Li ŝtele ĉirkaŭrigardis, jam estis tute mallume, nenie videblis iu. Li fiksis la fadenon al la fosto de la pordo, poste li reiris en la domon, fermis la pordon kaj la ŝlosilon zorge li turnis horizontalen, ke ĝi nepre ne povu elfali. Li pripensis, ĉu li aranĝis ĉion? Jes. Jam antaŭtagmeze li malfermis la kranon de la gasa kameno en la ĉambro de Kornelia. Ĉio estas en ordo. Li eniris al la edzino. Ŝi jam kuŝis en la lito.

– Ĉu vi jam glutis la dormigilon? – li demandis tute superflue, ĉar ŝi neniam estis akuzebla pri preterlaso koncerne siajn adoratajn medikamentojn.

– Kiam vi revenos? – demandis Kornelia.

– Mi klopodos rapidi. Ĝis la dekunua nepre. Sed se vi volas...

– Restu kviete, ĝis kiam vi volas. Sed nun mi petas kelkajn bagatelaĵojn, bonvolu alporti paperon kaj fontplumon.

– Kiel? – demandis Vojt – ĉu vi volas skribi nun, post la dormigilo?

– Nur kelke da linioj – diris la virino. – Mi timas, ke ĝis mateno mi forgesus ilin.

Sinjoro Vojt alportis la aĵojn, kaj adiaŭis. Estis jam preskaŭ la naŭa.

La sekvanta paŝo estas – pensis Vojt, kiam li jam sidis en aŭtomobilo – iom malfrue veni al la rendevuo. Simono estas homo preciza, iom riproĉema, li ne forgesos la malfruon eĉ post monatoj.

Sinjoro Vojt lasis malrapide rampi la aŭtomobilon. Subite timiga penso frapis lin: kio okazos, se Kornelia faris testamenton? Kio estas, se ne li estas la ĉefheredanto? Sed maleble. Li jam konas ĉiujn kapricojn de sia edzino. Se estus testamento, li nepre scius pri ĝi – li kvietigis sin.

En la klubo, Simono atendis lin, kun iom da malpacienco.

– Ne koleru – diris Vojt – hodiaŭ estis la interkonsiliĝo, kaj...

– Nu kio estas? – interrompis Simono.

– Kiel ni jam antaŭpensis, bedaŭrinde tute senespere.

– Terure – diris Simono kunsente. – Tio tute malĝojigas min.

– Vi devas pardoni al mi, sed mi petas vin, ni ne restu ĉi tie, ĝuste tiun vesperon. Ni iru kune hejmen al mi – diris sinjoro Vojt. – Ni povas paroli pri niaj aferoj ankaŭ ĉe mi.

– Ho, sed kiel vi pensas? Ĉu mi ĝenu vin ĝuste nun? Tiel malfrue turmenti vian kompatindan edzinon? Nepre ne. Niaj aferoj estas ne tiel urĝaj, ni priparolos ilin alifoje.

– Ni ĝenos neniun. Kornelia jam enlitiĝis – diris Vojt – ŝi prenis dormigilon; ni interparolos mallaŭte, kaj ŝi eĉ ne rimarkos nin.

– Nu bone, se estas tiel, ni iru – diris Simono.

– Ni atendu iom da tempo, estas eble, ke oni min serĉos ĉi tie per telefono – respondis Vojt, kaj pensis intertempe, ke la dormigilo estis prenita kvaronon antaŭ la naŭa, unu horon post tio ŝi kutime ekdormas, por la certeco estas necese aldoni ankoraŭ duonhoron, do, je la deka ili devas ekiri kun Simono, kiu estos eminenta atestanto, se necesus.

Ili trinkadis fortajn brandojn, kaj konversaciis pri ĉio, krom pri siaj aferoj. Simono pro diskreteco ne volis paroli pri la gravaj aferoj, pro kiuj ili kunvenis, ĝis Vojt ne komencas tion.

Ili trinkadis fortajn brandojn, kaj konversaciis pri ĉio, krom pri siaj aferoj. Simono, pro diskreteco ne volis paroli pri la gravaj aferoj, pro kiuj ili kunvenis, ĝis Vojt ne komencas tion. Kaj Vojt ne komencis. La tempo pasis rapide ĝis la deka. Telefonserĉado nature ne okazis, sed tion klarigi estis facile por Vojt.

Je la deka ili sidiĝis en aŭtomobilon, kaj ekveturis al la domo de Vojt.

– Mil diabloj – diris Vojt, kiam ili jam staris antaŭ la pordo de la vilao. – Mi kredas, ke mi faris grandan stultaĵon.

– Kial? – demandis Simono.

– Pro forgeso, mi lasis la ŝlosilon en la truo. Mi ne povas malfermi la pordon, de tie ekstere. Ne koleru, mia amiko, mi petas vin, bonvolu reiri al la aŭtomobilo, vi trovos en ĝi poŝlampon, kaj ankoraŭ kunportu ian ŝraŭbilon aŭ similan, mi eksperimentados dume per mia poŝtranĉilo.

Simono helpeme forrapidis.

Jen la tempo – pensis Vojt, kaj li jam ekkaptis la finon de la ŝnuro. Singarde li ektiris ĝin. Li sentis, ke ĝi malrapide ekstreĉiĝas, poste li sentis, ke profunde en la halo malrapide komencas turniĝi la klinko de la ĉefa gasfermilo, nun iom post iom plu, la stato de la klinko nun komencas proksimiĝi al la vertikala situacio, nun la maŝo devas forgliti de ĝi. Sed la fadeno subite haltis. La korpon de Vojt ekkovris ŝvito pro la ektimo. Nun kio okazos? Se la ŝnuro ne glitos de la klinko, kaj li ne povos ĝin malaperigi, tiam... tiam estus la plej bone, se... li eĉ ne povis pensi pri tio, kio sekvos. Li klopodis kuraĝigi sin. Li malstreĉis iomete la fadenon, poste komencis denove tiri ĝin delikate. La ŝnuro streĉiĝis, kiel kordo, trakuris en ĝi ektremo, kaj ĝi elglitis sen malhelpo tra la ventumfenestro. Sinjoro Vojt ekspiris. Li faldis la ŝnuron kaj metis ĝin en la poŝon. Ĵus venis reen Simono, portante la ilojn. Pro la ŝajno Vojt iomete manipulis ĉirkaŭ la seruro, poste li ekspiris:

– Tio ne sukcesos. Ni ne povos eniri. Ĉu estus malagrable, se mi pasigus la nokton ĉe vi?

– Ho, tute ne. Volonte mi gastigos vin – diris Simono. – Nature, grandan komforton mi ne povas promesi, sed ĝis la mateno ni fartos tute bone. Venu, amiko, venu, sed kion vi faros matene?

– Mi akiros seruriston, sed povas esti ankaŭ, ke Korñelia vekiĝos, lamados al la pordo, kaj malfermos ĝin. Matene jam ne estos malhelpo, sed nun... vi scias... la dormigilo... mi eĉ ne volas sonorigi. Sed ĉu estas certe, ke mi ne ĝenos vin? – demandis sinjoro Vojt.

– Tute ne. Venu! – respondis Simono ĝentile.

Ili ekiris sur la ĝardena vojo. Vojt ŝlosis la kradan pordegon, kaj ili ekveturis per aŭtomobilo.

La loĝejo de Simono estis agrabla hejmo de maljuna fraŭlo. Trinkaĵoj abundis, kaj Vojt volonte kvietigis siajn trostreĉitajn nervojn per brando. Ili fintraktis baldaŭ siajn komunajn aferojn, kaj apenaŭ estis iom post la dekdua horo, kiam ili enlitiĝis.

En la mallumo Vojt pensadis. Oni konstatos certe sinmortigon. Kornelia ja havas sufiĉe da motivoj, pri tio atestas la kuracistaj diagnozoj, ŝi estas kapabla movi sin tiom, por ke ŝi atingu la kranon de la gaskameno, kaj malfermu la kranon, kaj Simono estas la plej bona atestanto pri tio, ke li eĉ ne povis eniri la domon. Li pensadis pri tio dum la tuta nokto, li eĉ ne povis fermi la okulojn, eĉ ne por sola minuto, sed tiu fakto lin ne tre ĝenis. Li estis ĉiam malbonega aktoro, do, se oni vidos lin morgaŭ elĉerpita, estos multe pli facile ludi la tragikan rolon de edzo rompita de la sorto.

Jam mateniĝis, kiam tamen Vojt ekdormis.

Ne estis pli ol duonhoro, en surda nigreco. Subite li vekiĝis, ĉar Simono skuadis liajn ŝultrojn.

– Vekiĝu, amiko! Vekiĝu! Triumfo! Mi trovis por vi specialiston!

Vojt sidiĝis, nervoze.

– ...nu, li ne estas seruristo – daŭrigis Simono – li estas mekanikisto en riparejo de aŭtomobiloj, sed li diras, ke certe li venkos vian seruron. Se eble Kornelia ne povus eliri por malfermi la pordon, tiu ĉi bubo certe malfermos ĝin. Nu venu, vestu vin, ĉar la ulo atendas. Ĉu vi volas, ke ankaŭ mi kunvenu?

– Venu, se vi ne havas pli utilan aferon – diris Vojt, kaj pensis, ke eĉ li ne volis sola eniri la domon, li nepre bezonis almenaŭ unu atestanton, kaj jen, nun hazardo donacis al li du.

Kiam ili atingis la straton de Vojt, jam de la stratangulo ili rimarkis policajn aŭtomobilojn antaŭ la domo de Vojt.

Kiel? Ĉu jam malkovriĝis la okazintaĵoj? Antaŭ la okuloj de Vojt ekdancis nigraj ringoj. Kio nun okazos?

– Ĉu vi apartenas al ĉi tiu domo? – demandis la policoficiro.

– Jes. Mi loĝas en tiu ĉi domo kun mia edzino – respondis Vojt. – Kio okazis?

La oficiro etendis la manon kunsente.

– Sinjoro, mi petas vin, restu trankvila, okazis akcidento, pli ĝuste... – kaj li transdonis al Vojt paperfolion kunfalditan – tion ni trovis apud la kadavro.

La letero estis mallonga: „Ne koleru, mi subaŭskultadis, mi scias la rezulton de la kuracista interkonsiliĝo. Mi kredas, ke estos pli bone por ni ambaŭ, se mi faras tion, kion mi devas fari. Kornelia"

La pensoj de sinjoro Vojt kirliĝadis en paniko. – Kion tio signifas? – li demandis al la oficiro.

– Bedaŭrinde, la helpo alvenis malfrue – respondis la oficiro.

– Kial? Kiaspeca helpo?

– Trankviliĝu, amiko – Simono interrompis liajn vortojn – bedaŭrinde ŝajnas, ke io fatala okazis dum ni...

– Mi kredas, sinjoro – ekparolis la oficiro – ke estus la plej bone, se vi eĉ ne enirus la domon. Ni mem ne scias precize, kio okazis. Mi jam aranĝis, ke oni forportu la kadavron. En la domo mi devas ankoraŭ ekzameni kelkajn aĵojn. Se vi fartus nebone, nia kuracisto estas ankoraŭ ĉi tie, li helpos vin. Mi konsilas al vi iri eble en hotelon, aŭ al amiko...

Simono interrompis denove:

– La nokton ni pasigis kune, ĉe mi, ni reiros en mian loĝejon, sed mi pensas, ke ne malutilus trankviliga tablojdo. Kie estas tiu kuracisto?

– Morgaŭ aŭ postmorgaŭ ni vizitos vin – la oficiro diris al Vojt, kiam ili sidiĝis en la aŭtomobilon. Tiun ĉi fojon Simono gvidis la veturilon.

Oni vokis Vojton post du tagoj al la polico. La sama oficiro akceptis lin, kiun li jam konis.

– Stranga afero – la oficiro diris – preskaŭ nekomprenebla. Mi petas vin, rakontu al mi detale la historion de tiu vespero.

Vojt komencis pri la interkonsiliĝo, finis pri la matena renkontiĝo, kaj apenaŭ li ellasis ion.

– Jes – diris la oficiro – la afero estas klara kaj hela. Via rolo estas evidenta – kaj li strange rigardis al Vojt.

Sinjoro Vojt sentis stomak-kirliĝadon. – Kion signifas „rolo"? – li demandis.

– Vi havas multe da atestantoj. En la klubo, koncerne viajn alvenon kaj foriron, precizajn temppunktojn vi havas, sur la seruro ni trovis la postsignojn de la vana eksperimento por eniri, ankaŭ la domzorganto de sinjoro Simono klarigis al ni pri via kuna nokto, vi staras certe super ĉiu suspekto.

– Ĉu suspekto? – Vojt demandis iom pli kvieta. – Sed pri kio vi suspektas? Pardonu min, sinjoro, se mi demandas, sed eble vi rakontus al mi, de kiu vi informiĝis pri la okazintaĵoj?

– Ni ricevis anoncon de la najbaroj – diris la oficiro – ke ili sentas fortan gasodoron.

– Tio estas nekomprenebla. Ĉu odoron de gaso? Ĉu la najbaroj? Sed ja eĉ la plej proksima domo staras je la distanco de dudek metroj – kaj Vojt denove komprenis nenion.

– Jes, sed se vi povas rememori, post la venta nokto tiun tagon sekvis tute senventa kaj sufoka mateno. Krom tio, la fenestro de tiu ĉambro, en kiu fluis la gaso, estis malfermita.

– Kiel?

– Mi diras – ripetis la oficiro – la fenestro de la ĉambro de via estimata edzino estis malfermita.

– Sed mi...

– Ĉu vi volas diri, ke vi fermis ilin.

– Ne, aŭ ĝuste dirante mi ne memoras.

– Ĝi estis malfermita – diris la oficiro.

– Strange – prononcis Vojt distrite.

– Jes, ege strange – la oficiro diris, pripenseme – eĉ simple tio estas neklarigebla. Oni informis nin pri la gasodoro, kaj vi tion ankoraŭ ne scias, ĉar tion ni tenis en sekreto, tamen via edzino mortigis sin ne per gaso.

– Sed? – demandis Vojt, kaj li sentis, ke li ne toleras plu.

– Per dormigaj piloloj. Kaj, kio estas la plej stranga en la tuta afero, la fluo de gaso komenciĝis tiam, kiam via estimata edzino jam estis morta. Ĉar en ŝia korpo ni trovis neniun spuron de gaso, spite la plej zorgan laboratorian ekzamenadon.

– Ĉu eble pro la malfermita fenestro?

– Ne, ne. Mi eniris unua la ĉambron, kaj mi sentis, ke la gaso estis tiel densa, kiel en gasujo. La fenestro estis malfermita nur iomete. Apenaŭ fluis gaso el la ĉambro, la najbaroj eksentis ĝin nur tial, ĉar, kiel mi jam diris, tiu mateno estis tute senventa. Do, via estimata edzino jam estis morta, kiam iu turnis la kranon de la gaskameno – diris la oficiro, kaj denove fiksis la rigardon al sinjoro Vojt.

Vojt ne kapablis diri ion ajn.

– Sed kiu tion faris, kaj kiel li faris, tio estas tute nekomprenebla – daŭrigis la oficiro. – Vi havas alibion, pri ĉiuj viaj momentoj, vi havas ankaŭ atestanton, ke vi eĉ ne povis eniri la domon, ni trovis nenian indikon pri tio, ke alia homo eniris tien, sed, ĵus venis al mi ideo, ĉu vi ne restis sola nur dum unu momento, kiam vi alvenis kune kun via amiko?

– Eble dum duonmomento – diris Vojt – kiam mia amiko reiris al la aŭtomobilo por porti al mi ilojn.

Ili gapis unu la alian, dum longeta tempo. Reciproke ili sciis, pri kio pensas la alia.

La oficiro finfine ekparolis:

– Ĉu vi estas la sola heredanto?

– Laŭ mia scio, ne estas testamento.

– Nu tiam laŭjure ĉio restas por vi. Nu, sinjoro, mi volas eviti vian malpaciencon koncerne nian laboron, ankoraŭ ni ne metas flanken la aferon, kvankam ĝi estas iom senespera. Simple ni ne scias, kio estas la sekvanta paŝo.

Vojt apenaŭ povis reteni sian ĝojon, kaj ne marŝi dancante sur la koridoro. Pato – li pensis – mi supozas, tiel oni nomas, kiam ŝakludanto kiu sekvas, ne povas paŝi, ĉar la figuroj de la kontraŭulo kontrolas ĉiun kvadraton, sed la kvadrato, kie staras lia reĝo, estas sekura. En tiaj kazoj neniu venkas, sed ankaŭ ne malvenkas. Konsiderante, ke ĉi tiu estis mia unua partio, mi kredas, ke mia produkto estas sufiĉe bona.



Koperniko

Endre Ady



Madách

Skulptisto Imre Varga

Sur la titolpaĝo de nia numero 1981/4 videblas kulturdomo en la urbo Tatabánya, kaj antaŭ ĝi staras la statuo „Orfeo" de Imre *Varga,* eble la plej fama vivanta hungara skulptisto. Liaj verkoj ĉiam estis alte ŝatataj kaj taksataj en Hungario kaj ankaŭ eksterlande, kaj – neofta afero – pri la apartaj valoroj de lia arto konsentas la kritikistoj kaj la publiko.

La statuoj de Imre Varga estas facile kompreneblaj, li malŝatas la pene deĉifreblajn enigmojn. Li volas influi la homojn per siaj statuoj, kaj pro tio gravas por li ne stiloj kaj manieroj, sed la efiko, kiun la verko atingas, ĝiaj ampleksoj kaj profundeco. Li opinias jene: „Vere, oni povas elvoki el la homa animo nur tiujn sentojn, kies bazon oni havas en la cerbo. Sed ne estas indiferente, kiuj aktiviĝas el la multegaj travivaĵeroj, kiujn la epoko enigis en nin, kaj kiuj el tiuj travivaĵeroj fariĝas parto de onia personeco."

La apude videblaj verkoj donas nur imagon pri la efikpovo de liaj statuoj, ja tri-dimensiaĵoj, perfortitaj sur ebenon, kvazaŭ perdas sian esencon. Tamen, la busto *Madách* eĉ tiel povas multon esprimi el la amara personeco de la aŭtoro de „La tragedio de l' homo", ian miksaĵon de rezignacia saĝo kaj freneza, volema spito. Ankaŭ la reliefo *Ady* kaptas efike la kernajn pensojn de la Ady-a poezio, fandante la abstraktajn pensojn je senpere sensebla, okulrava formarto. La statuo de *Koperniko* ankaŭ prezentas iel mirindan enformigon de mondsignifaj pensoj – tamen sen ia ĝena troŝarĝado de la prilaborata materio (ĉi-okaze bronzo).

Ni finu tiun ĉi prezenton per vortoj de la kritikisto Márta Harangozó:

„Li ne havas periodojn, nur seninterrompan krean laborprocezon, kiu lanĉas foje tiun, foje alian solvon... Liaj verkoj estas pruvoj de nova harmonio de kre-metodoj kaj arta realigo, ĉar li serĉas ne temon por metodo, sed ĉiam metodon por la eterna temo – la homo." *V. B.*



PANORAMO **

La nova minejo en Nagyegyháza (ĉe Tatabánya)

Festivalo de TV-filmoj

En multaj landoj la televido praktike malplenigis kinejojn – maliculoj diras, ke kinoreĝisoroj preparas siajn filmojn ne por la publiko, sed por ĵurioj de filmfestivaloj. La publiko rigardas televidajn filmojn.

Estas dezirinde, ke ankaŭ televidaj filmoj havu artan forumon, ja ili povas kun ega forto influi – eduki aŭ miseduki – la publikan guston. Tia forumo por hungaraj televidaj filmoj estas la TV-festivalo, kiu okazas regule en la urbo Veszprém. Tie kritikistaj kaj sociaj ĵurioj prijuĝas la jaran filmprodukton de la Hungara Televido, kaj oni disdonas diversajn premiojn de ŝtataj instancoj kaj sociaj organizaĵoj. Per la dua kanalo ankaŭ la tutlanda spektantaro povas vidi tiun revuon de la TV-filmoj, kies nivelo cetere tute ne postrestas al tiu de la hungaraj kinofilmoj.

Ĉu hungara futbalo renesancas?

La hungara nacia teamo dum la lastaj jaroj ne dorlotis la ŝatantojn de tiu sporto. Antaŭ tri jaroj, dum la mondĉampionado en Argentino, ĝi atingis ĵa plej malbonan rezulton inter la 16 partoprenintaj teamoj.

Dum tiu ĉi printempo komenciĝis la selektomatĉoj por la sekva mondĉampionado. La hungara teamo startis bone – ĝi atingis 2:2 kontraŭ svisoj en Lucerno, venkis en Oslo la norvegan kaj en Budapeŝto la rumanan naciajn teamojn. La belan serion rompis la angla teamo per sia venko en Budapeŝto, tamen, tio ne forigas la hungarajn esperojn pri partopreno en Hispanio venontjare.

Unu jaron pli frue

Fine de junio eklaboris la dua minejo de la hungara „eocen-programo", kiu celas utiligon de la hungarlanda karboprovizo, kontribuante al la malpliigo de la „nafto-fakturo" de Hungario.

La moderna minejo funkcias en Nagyegyháza (apud Tatabánya), kaj ĝi liveros karbon, utiligotan por produktado de elektra energio. Post kvar jaroj la sama minejo liveros ankaŭ baŭksiton kaj trinkakvon – tamen iuj ekonomiistoj trovis, ke la unujara gajno ĉe la inaŭguro superproporcie altigis la kostojn, kiuj tiel atingis 6700 milionojn da forintoj. Ĉiukaze, la nova minejo signife kontribuos al la malpliigo de la terure multekosta energio-importo.

Lago ĉe la landlimo

La lago Fertő (germane: Neusiedler-See) kuŝas sur la aŭstra-hungara landlimo. Ĝia pli granda parto apartenas al Aŭstrio, kaj aŭstroj intense ekspluatas ĝiajn feriajn kaj turismajn eblojn. En Hungario tiukampe Balaton ĉiam havis prioritaton, kaj la lago Fertő servis fakte nur kiel rikoltejo de kano.

Nun komenciĝis aŭstra-hungara kunlaboro por turisma utiligo de la hungarlanda lagobordo. La unua tasko estas haltigi la tre rapidan ŝlimiĝon de la lago, ja tio minacas eĉ ĝian ekziston. Meritas apartan atenton ankaŭ la sanigaj mineralakvoj, kiuj troviĝas *sub* la hungarlanda parto de la lago. La hungara Fertő-bordo malhavas la riĉan infrastrukturon de la Balatona regiono, sed ĝuste tial ĝi konservis sian originan, naturan belecon. Espereble per la turisma ekuzo tio ne tute malaperos.

Hungara-Soveta Festivalo

Inter la 20-a kaj 26-a de julio okazis en Hungario la 3-a Hungara-Soveta Junulara Festivalo de Amikeco, kiu celas helpi al la junaj homoj de la du landoj reciproke ekkoni la vivon unu de la alia. Enkadre de la Festivalo venis al Hungario multaj grupoj de sovetaj gejunuloj, kiuj vizitis ne nur la ĉefajn turismajn vidindaĵojn de la lando, sed ankaŭ multajn fabrikojn, agrikulturajn kooperativojn, sciencajn institutojn ktp. por akiri konkretan impreson pri la laborcirkonstancoj kaj ĉiutaga vivo de la hungara junularo.

La programo de la Festivalo estis tre riĉa, precipe ĝiaj kulturaj eroj. La

Lago Fertő – ankoraŭ pompas la netuŝita naturo

PANORAMO

Sceno el la Budapeŝta prezentado de la teatraĵo de András Sütő

hungaraj literaturamantoj povis persone renkonti la mondkonatan sovetan verkiston Ĉingiz Ajtmatov, kies libroj estas tre popularaj en Hungario. Ne mankis ankaŭ amuzaj programoj – inter ili elstaris amasa surstrata balo.

Protektita birdokolonio

Oni deklaris „naturprotektita objekto" interesan kolonion de murhirundoj („delichon urbica") en la interna urboparto de Szolnok. Pluraj centoj de la birdoj konstruis sian neston sub la balkonoj de la urbocentraj domoj.

Printempa Festivalo – kun Esperanto-teatroj

La Hungara Tutlanda Turisma Oficejo en marto aranĝis sukcesan Budapeŝtan Printempan Festivalon, kiu celis emfazi kulturajn aspektojn de la Hungarlanda turismo. La eksterlandaj gastoj, partoprenintaj la Festivalon, estis tre kontentaj pri la alta nivelo de la kulturaj programeroj.

Venontjare oni denove aranĝos la Festivalon, kiu ĉifoje havos ankaŭ Esperantajn programojn. Enkadre de la Festivalo okazos la Dua Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, kaj la kostojn de la aranĝo kovros Turisma Oficejo. Kiel konate, la Unua Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj okazis antaŭ tri jaroj en Gdansk.

„Geedziĝa festo en Suza"

Tio estas la titolo de nova teatraĵo, verkita de András *Sütő*, Rumania hungara prozisto kaj dramaturgo. La unua surscenigo de la dramo okazis en la hungarlingva teatro de Cluj, sed printempe de 1981 okazis aŋkaŭ la Budapeŝta premiero – kun granda sukceso.

La dramo revivigas epizodon de la militiro de Aleksandro kontraŭ Persujo. La helena imperiestro – por forte ligi al si la konkeritan popolon – dek mil siajn soldatojn edzigas perforte al dek mil persaj virinoj. Li atendas, ke tiamaniere persoj heleniĝos. Sed okazis male – la helenaj soldatoj persiĝis. La dramo de *Sütő* estas potenca pledo kontraŭ ajna kultura imperiismo.

Internacia konkurso de velboatoj sur la lago Fertő



En kuirejoj,
hospitaloj,
nutro-centroj por infanoj
kontentigas specialajn postulojn la

KERPAR

KAĈIGA MAŜINO

En ĉiuj grandaj kuirejoj kaj preparejoj de malvarmaj pladoj ĝi estas efika ilo por dispecigo de petroselo, aneto, apio kaj cepoj. En malgrandaj kuirejoj, ekz. en hoteloj, dietaj kuirejoj de hospitaloj, en nutro-centroj por infanoj ĝi estas multflanka maŝino ĉe kontentigo de specialaj postuloj. Nur ŝanĝante la funkcitempon inter 5 kaj 100 sekundoj oni povas uzi ĝin por diversaj celoj: dispecigi brasikon, okzalon, spinacon, mueli viandon aŭ kaĉigi ĝin por pasteĉo. La maŝino dispecigas malmolan fromaĝon, kirlas kazeaĵon, preparas majonezon kaj spicitan majonezan saŭcon. La kaĉigon plenumas giranta serpotranĉil-paro. La sekuran funkciigon servas aŭtomata kovrilferma mekanismo.

Teknikaj indikoj:

Larĝo	300 mm
Alto	522 mm
Profundeco	385 mm
Pezo	25 kp
Nominala volumeno	6 litroj
Plenum-tempo	10-100 sek. (dependas de la prilaborata materialo kaj de ĝia moleco)
Funkciiga tensio	380/220 V, 50 Hz
Funkciiga povo	750 W

Budapest V. Bajcsy-Zs. u. 72. Tel.: 313–124
Disvendas: MÜÁRT kaj VOSZK

REVUO DE REVUOJ

Kiel atendeble, estis HEROLDO kiu prezentis plej vaste la informojn pri la kongreslando Brazilo. El ĝia Suplemento, dediĉita al tiu kontinentgranda lando, mi trovis plej interesa la kompaktan konigon pri la malfeliĉa sorto de la brazilaj indianoj. Mem la nuntempa civilizacio per siaj plej diversaj akcesoraĵoj montriĝas al la indianoj vera minaco. Dum la jarcentoj la blankaj h... – mia plumo haltis antaŭ ol skribi tiun kvarliteran vorton *homo*, tamen laŭaspekte ili ŝajnis tio – ekstermis tie tutajn popolojn; depost la malkovra periodo la pluraj milionoj de la brazilaj indianoj ŝtrumpis al la hodiaŭaj 0,07 milionoj, jes, nenia eraro: al *70 miloj*... La artikolo elmontris, kiel – regulmaniere! – difektiĝis la iam favora indianpolitiko, ĝis sia plena fiasko!

Nian E-gazeton mi metis flanken. Kaj ekturniĝis en mia menso aro da pensoj pri belaj revoj, pri religiaj kredoj kaj ordonoj, pri Homaranismo, pri esperdona lingva interkompreniĝo, pri helplingvo, kiu povus helpi interpaciĝi... ĉu al la blankaj terrabistoj, ĉu al la „malestimindaj, kuprahaŭtaj, praarbaraj sovaĝuloj"? ... Ĉu la „Indianoficejo" avide kaptos nian *neŭtralan* lingvan rimedon por interpacigi la du „egalajn" flankojn? Kaj se la indianoj ne emos lerni ĝin, aŭ se tamen, sed uzos ĝin por defendi sin, ili *devios* de la neŭtraleco, ĉu? Tiam kion fari kun tiuj *negativaj uloj*, kiuj certe meritos sian sorton?

Sed mi devas halti, kaj iom klarigi. Ne kredu, ke estis mi, kiu konfuziĝis. Misŝance por mi, antaŭe mi legis de kontraŭesperantista skribulo artikolon E-lingvan – jes, *originale* E-lingvan, ne ian tradukaĵon! – kaj en ĝi la sorton de li destinitan al la esperantistoj. Solene deklariĝis: estos plezuro, se *uragano forblovos* plej grandan parton de la esperantistoj! Ili ja estas nur *negativa parto*. „Nur dek procentoj da honestaj esperantistoj pli ol sufiĉas" – jen la bela perspektivo! Ĉu lia propra ideo estas tiu ĉi grandioza, aŭ pli ĝuste: kranioza? Eble tio plezurigas skalpemulojn ĉirkaŭ ia Blanka Ĉefo, sed naŭzas ĉiujn esperantistojn. Malvaloras la penon provi firmigi la menciitan *ventsakon* per paraj agrafoj, per retoj de retorikaĵoj – ĝi aŭ li nature elpumpiĝas *el* la movado.

LA MOVADO – jen nia fokusvorto, sed nun temas pri la japana, jubileanta organo. Je la 30a jarreveno ĝi eldonis ekstran numeron, kies „japana florbukedo el poemoj" kvazaŭ gratulas al la redaktoroj kaj al la fidelaj legantoj – al kio ni plenkore aliĝas. Kiel Konisi Gaku, same deziras H.V.: *elane por pluaj 30 jaroj!*

Se jam ni stacias ĉe la Pacifika Oceano, la reapero post iom longa paŭzo de LA ESPERO en Suda Koreujo altiras nian atenton al la tiea movado. Pri tio, pri landa E-kongreso kaj viglaj universitataj moviĝoj kontente ni legis en tiu ĉi belaspekta kaj laŭgrade pliboniĝanta revuo.

Ŝajnas sukcesa la ampleksigo – jam sur 32 paĝoj – de ESPERANTA FINNLANDO, kiu spegulas ankaŭ progreson de la movado. La gazeto aliris bonan, taŭgan vojon: malpli ol lokaj bagatelaĵoj, la E-a kulturo ricevas pli da loko, pli da akcento: orientigaj recenzoj kaj intereson vekaj lingvaj observoj, inter kiuj mi ellevas tiujn pri la „finnismoj". Do unuvorte: plaĉa kaj varia gazeto. Pli kaj plu!

D-ro Artur *Bormann* en sia multvalora INFORMA SERVO prezentas abunde pri la interlingvaj aferoj kiujn laŭmerite kaj laŭgravece konigi ĉi tie ne permesas la spaco de mia rubriko. La malavantaĝoj de la angla lingvo por servi kiel interlingvo tra la mondo estas ne sufiĉe konataj de la publiko, eĉ ne de esperantistoj. Prudente – kaj singarde – oni devas paroli pri tiuj, ne „kontraŭbatali la anglan", sed malmistifiki ĝian miton, kiu efektive, ĉar ankaŭ spirite penetrante, plurrilate kaŭzas ardajn malavantaĝojn al la ne angle parolantaj popoloj tra la vasta mondo. La granda aro da idiotismaj esprimoj (ĉu lernendaj, ĉu kompreneblaj?), la ega distanco inter skribo kaj prononco, kaj aliaj *lingvaj* misaĵoj, inter ili la troa ŝparemo, kaj manko de gramatikaj rimedoj, ververe malebligas al la angla plenumi la funkcion de pontlingvo en monda skalo. Richard *Schulz* sukcesis trakti tiun temon tre klare en Paderborn – lian prelegon publikigis la okcidentgermana eldonejo Bleicher kiel AKTUELLE INFORMATION germanlingve.

Necesus pli da loko por superrigardi HOMO KAJ KOSMO, kiu plenumas altnivele popularigon de natursciencoj. El la lingve senriproĉaj (fakaj terminoj!) publikaĵoj mi aparte suprenigas la ampleksajn artikolojn de prof. Zdenko *Markoviĉ* pri la ekesto kaj geologia evoluo de la Tero, laŭ la modernaj teorioj de la kosmologio kaj kontinentmoviĝoj (tabulo-tektoniko). Krom la lingva flanko, ankaŭ la maniero de popularigo prezento estas ĝuindaj, kion oni ne ĉiam povas mencii pri sciencaj artikoloj.

Se jam mi komencis tiel, mi ankaŭ finas skribante pri subpremoj. Pri tiu daŭra plago de nia „ankoraŭ evoluanta Tero" venis raportoj al INTERNACIISTO el diversaj regionoj: Afriko, Katalunio, eĉ senregione, pri stato de l' ciganoj. Kompreneble la akcento tuŝas prefere la lingvan diskriminacion, tiun ĝenerale „konvenan" rimedon kontraŭ la popola identeco kaj ekonomia memstareco. En tute alia maniero prezentiĝas la premita sorto de la japanaj virinoj en SEKSO KAJ EGALECO. La originala raportaĵo priskribas en Eŭropo jam ne imageblan situacion de japaninoj, tian, ke ĝia transformado ankoraŭ ne montras al helaj horizontoj; des pli, ĉar ekonomiaj krizoj ĉiutempe forte prokrastigas la virinan emancipadon. Ni estu esperantaj ankaŭ tiurilate – kiel amikoj de ĉiaj homaj rajtoj.

Ervin *Fenyvesi*

La prospero de la Budapeŝta akvoprovizado

D-ro Ferenc László

Esplorantoj de historiaj urboj jam delonge venis al la konkludo, ke en ilia evoluo ĝenerale havis gravegan influon la akvaj cirkonstancoj. Ne okazis alie koncerne la Hungarlandan ĉefurbon, Budapeŝton: ĝi kreiĝis kiel apud-Danuba urbo ambaŭflanke de tiu riverego, kaj pere de tiu ĉi fluo ĝi evoluis du-miliona-metropolo. Kaj ne nur en la modernaj tempoj: laŭ arkeologiaj esploroj tiu loko jam de praaj tempoj prezentis preferindan loĝlokon por homgrupoj.

Niaj legantoj jam scias, ke tri urboj unuiĝis – *Buda* kaj *Pest* „liberaj reĝaj civitoj", kaj urbeto *Óbuda* – por krei la indan Budapeŝton. La plej malnovan tradicion havis Óbuda, sur kies loko la keltoj antaŭ pli ol dumil jaroj fondis la urbon *Ak-ink*.

Okazis ĝuste komence de nia kalendaro, ke la Romiaj legioj okupis tiun urbon – kies nomo signifas abundan akvon – kie ili kreis multe pli grandan urbon, kaj por la soldatoj, kaj por la civilaj loĝantoj: *Aquincum*. La „abunda akvo" el fontoj (nun en la tn. Romia Banejo) facile kontentigis la Romianojn, kiuj establis bankulturon, kaj pro tio havis aparte grandan akvobezonon. La 5 km longa akvodukto parte estas ankoraŭ videbla kun la iamaj pilastroj preter la ŝoseo kondukanta de urbo Szentendre al Buda. Kaj de la akvodukto disbranĉiĝis la tiama, inĝeniere projektita akvoprovizo, tra la ĉefurbo de la provinco Pannonia.

Oni devas mil jarojn atendi post likvido de la Romia urbo, ĝis eblas paroli denove pri akvoproviza sistemo. Komence de la 15a jarcento reĝo Sigismundo (Luksemburga) inaŭguris grandan konstruadon de reĝa palaco kaj fortikaĵo sur la apudrivera monteto; ties akvobezonon oni parte gajnis per pumpilaro kaj plumbo-kondukilo el la Danubo. Tiucele estis konstruita ĉeborde barbakano kaj sur la montdeklivo suprenkuranta remparo, kiuj devis ŝirmi la sistemon okaze de atako. Buda estis do la unua hungara urbo havanta akvodukton.

Poste reĝo Matiaso ampleksigis la akvoprovizon de Buda: liaj teknikistoj enkondukis *tri fontojn* de la proksima Monto Libereco (laŭ nuna nomo) en la akvoduktaron: la Ŝvab-, Urb- kaj Béla-putojn. La du lastaj – kiuj dum pluraj jarcentoj kontentigis la bonan akvobezonon de la urbo – estis nuntempe laŭ la iamaj formoj renovigitaj kaj restas kiel monumentoj.

Ankaŭ la urbo Pest akiris en la mezepoko sian akvoduktaron. Arkeologie pruviĝis, ke la akvon donis putoj sude de la urbo (Elias-puto), de kie argilaj tuboj kondukis la akvon tra la nuna Placo Kalvin trans la urbomurojn. Probable ankaŭ tiu kondukilo estis dum la regado de Matiaso konstruita.

Ĉio ĉi plejparte detruiĝis dum la turka okupado kaj dum la rekonkera sieĝo. La restaĵojn de la mezepokaj akvoprovizaj sistemoj poste renovigis eminentaj hungaraj kaj eksterlandaj fakuloj, kiuj eĉ kompletigis kaj ampleksigis ilin. Tamen tiuj sistemoj kapablis provizi nur malgrandajn areojn.

Ververe, en Budapeŝto la akvoproviza servo estis inaŭgurita en 1868 – se ne kalkuli la disopajn instalaĵojn –, kiam oni establis ĝin sur la Peŝta Danub-bordo, norde de la nuna Parlamentejo. La konsilio de urbo Pest decidis pri tio jam en la antaŭa jaro – post kiam sukcesis la historia kompromiso inter la lando kaj la Habsburga reĝo –, kaj la projektadon ĝi komisiis al la angla inĝeniero William Lindley. Siatempe oni konsideris lin la plej eminenta projektisto de akvoprovizejoj, kreinta inter aliaj tiujn de Londono kaj Frankfurto.

La konstruata akvorezervujo (Kőbánya) en 1871.



La konstruaĵo de la pumpejo por Buda, en 1895.



Vico da putoj surborde de Insulo Szentendrei.

La konstruado de la akvoprovizejo okazis sufiĉe rapide sub la direktado de Lindley, kaj samjare ĝi komencis jam la servon. Origine Lindley rekomendis mekanikan filtradon, sed fine – precipe pro financaj obstakloj – li volis utiligi la naturan filtradon. Sed tiutempe ne estis ankoraŭ kutima la utiligo de la preterriveraj gruztavoloj, kiel kolektantoj kaj filtrantoj de l' akvo, do la plano de Lindley ŝajnis tro kuraĝa, kaj tial ne facile estis akceptita. Cetere li faris kompletan planon por provizi la urbon: post la menciita provizora instalaĵo li intencis la definitivan akvoprovizejon konstrui surborde kontraŭ la Insulo Margit.

Por la angla inĝeniero la natura filtrado ŝajnis altrudita, sed la unuaj direktoroj de la *Ĉefurba Akvoproviza Servo* (János Wein, poste Mihály Kajlinger) konscie kaj laŭprincipe disvolvis ĝin al alta nivelo en la tuta ĉefurba sistemo. La leĝa unuiĝo de Buda, Pest kaj Óbuda (1873), kaj la enoficigo de la unua direktoro (J. Wein) donis novan elanon al la prospero de la akvoprovizado.

Wein ricevis pezajn taskojn kaj en Pest, kaj en Buda: meti la fundamenton, nun jam definitivan, por la tuta sistemo; ja la menciita akvoprovizejo de Lindley estis konsiderata provizora ne nur de la projektinto, sed ankaŭ de la ĉefurba estraro. Kaj Wein estis konscia adepto de la naturfiltra sistemo, kies bazojn li ankaŭ science metis. Al li kaj al la aliaj fakuloj estas dankebla la kreo de sistemo, kiu jam pli ol cent jarojn servas la kreskintan urbegon kaj prezentas eĉ nun bazon por la plua disvolvo de la akvoduktaro.

La planojn kaj ideojn de tiuj ekspertoj daŭrigis la *Ĉefurba Akvoproviza Servo,* kiam oni konstruis la ĉefuzinon en Káposztásmegyer kaj pli norde ekipis la akvoproduktajn terenojn sur la maldekstra bordo kaj sur la Insulo Szentendrei. Ties bonkvalita akvo nun jam ne sufiĉas: la saman ideon sekvante oni komencis eksplŭati *sude* de la urbo la Insulon Csepel, ties bonkvalitan akvon produktantajn bordterasojn.

La supraj alineoj bone montras, ke Danubo kaj ĝiaj cirkonstancoj formas gravan bazon por la akvoprovizo de Budapeŝto. La geografiaj cirkonstancoj determinis jam siatempe, kie lokigi la urbon fondotan. La Danuba nivelvariado, la multaj movoj de la akvo-amaso ene de la gruzteraso, kontribuis al la ĉefurbon kontentiganta, abunda kaj altkvalita akvoprovizado.

Ne malhaveblan rolon plenumis Danubo en la forigo de la ĉefurba kloakakvo kaj precipitaĵo. Ĝia amplekssa fluo kapablis ĝis la lastaj jaroj, la plejparte nepurigitan kloakakvon maldensigi, kaj kunporti, sen grava damaĝo. Sed ĉe tiu punkto ni devas rimarki, ke la utiligo, aŭ alie dirante: la ekspluato de la naturo jam transpasis la limojn de la permeseblo! Tiu vivodona riverego jam ne estas la ofte menciita *„blua Danubo"*, kies akvo antaŭ 4-5 jardekoj estis ankoraŭ neriproĉebla kvalite. La nuna Danubo, bedaŭrinde, pro la teknika prospero, pro ties damaĝaj sekvoj necese akceptas multe da malpurigaj materialoj. Venis jam la tempo, ke la apudaj landoj agu ĉiel por protekti la purecon de la Danub-akvo. Komune, kunlabore, tiu gravega problemo estos solvebla.

La agado de la Ĉefurba Akvoproviza Servo

Jam dum pli ol jarcento tiu entrepreno kontentige servas kaj plenumas la akvobezonojn de Budapeŝto. Vere longa tempo! Dume la Servo travivis

En la suda parto de Budapeŝto, sur la placo Gilice oni konstruas novan akvorezervujon



En la internaĵo de la Budapeŝta Gellért-monto oni konstruis novan akvorezervujon kun kapacito de 40 000 kubaj metroj: ĝi plibonigas la akvoprovizadon de la internaj kvartaloj de la urbo

du mondmilitojn, ekonomiajn krizojn, mizerajn periodojn kaj egajn mankojn, tamen ĝi seninterrompe kaj daŭre liveris por la ĉefurbaj konsumantoj la nemalhaveblan, la vivon signifantan kaj simbolantan, bonkvalitan akvon.

Estas aparte interese, kiel okazis dum la *dua mondmilito,* kiu alportis bombadojn kaj longan batalon por liberigo de Budapeŝto. La akvoduktaron damaĝis pli ol mil difektoj. La riparlaboroj ne ĉesis eĉ dum la bataloj, sekve de tiu heroa, modela devoplenumo de laboruloj de la Akvoproviza Servo, el inter ili 22 kolegojn atingis la heroa morto. Al ilia sindona laboro estis dankeble, ke en Pest nur kelkajn horojn mankis akvo, kaj eĉ en Buda, kie la batalo daŭris plej longtempe, nur kelkajn semajnojn forestis la akvoprovizado.

Post la liberiĝo de la ĉefurbo la riparlaborojn eblis pli rapide plenumi: la unua libera 1a de Majo en 1945 vidis la 94%-jn de la 1376 km akvoduktaro jam denove funkcikapablaj. La egajn damaĝojn de la konstruaĵoj kaj maŝinoj oni rekonstruis en 60% ĝis la majo de 1946. Kaj en 1947 la akvoprodukto reatingis tiun de la jaro 1944 – 88 milionoj m³ –, kaj samjare sur la rekonstruita Ponto Libereco estis per kvar akvokondukiloj ree interligitaj Pest kaj Buda.

La evolua rapido de la sekvaj 35 jaroj superis tiujn de la antaŭaj periodoj. Karakterizas tion la altega produkto en 1980, kiu kulmine superis la 300 milionojn da km³. Cele al la plej grava tasko: kontentigi la trinkakvobezonon de la loĝantaro, publikaj instancoj kaj industrio, estis laŭplane disvolvita la tuta akvoproviza sistemo, tempe kaj loke ĉiam konforme al la ŝanĝiĝantaj bezonoj.

La akvoprodukta sistemo

La plej grava produktejo de la trinkakvo estas la Insulo Szentendrei, kie senriproĉan akvon produktas la surbordaj, memfiltraj putoj. La akvo tra malaltpremaj duktoj fluas tra sub-Danubaj tuneloj al la pumpilejo en Békásmegyer, respektive al la ĉefuzino en Káposztásmegyer; tie ĝi renkontiĝas kun la akvo de la maldekstra bordo. Sur la insulo estis konstruita 60 km da malaltpremaj duktoj; produktaj putoj servas pli ol 600.

La menciitaj du grandaj uzinoj distribuas al la norda regiono kaj la norde produktitan akvon, kaj la purigitan akvon de la Malgranda kaj de la Granda Surfaca Akvoprovizejo. Tiuj prenas el la Danubo kaj per modernaj metodoj plene purigas la akvon, 25 mil³, resp. 200 mil m³ tage.

Krom la nordaj produktejoj ankaŭ interne de la ĉefurbo funkcias akvoproduktejoj, restaĵoj de la malnovaj provizejoj. Sur la dekstra riverbordo kaj sur Insulo Margarita nature filtrantaj putoj produktas la trinkakvon; ĉe la Kossuth-placo, tiu el la maldekstra fluujo-rando devenas. Funde de la riverbranĉoj estas kondukata la insula akvo al la dekstra, resp. maldekstra Danub-bordo.

Delonge jam la ampleksiĝo de la ĉefurbo postulas – venonte eĉ pli necese –, ke la priskribita norda provizado prenu novan formon: tiun de norda kaj suda akvoprodukta sistemo. Nun jam funkcias sur la Insulo Csepel du uzinoj (Szigetszentmiklós): la uzino I utiligas 6 putojn kaj 12 ramitajn pumpilojn por 100 mil m³ tage; la uzino II la akvon de 7 enramitaj pumpiloj kondukas rekte en la duktaron, konforme al la momentaj bezonoj.

En la sudo de Buda, en Budafok kaj Budatétény ankaŭ troviĝas akvoproduktaj putoj, kies akvon malgrandaj maŝinejoj kondukas en la duktaron per iom plia premo. Krom la jam menciitaj, ankaŭ la Orient-Peŝtaj periferiaj akvoprovizejoj partoprenas la servon. La maŝinejo en Mátyásföld pumpas akvon en la duktaron el 8 profundaj putoj; krome funkcias apartaj negrandaj akvoprovizejoj kun propra distribuado (Rákos).

La produktitan akvon la maŝinejoj devas distribui al la konsumantoj tra la



La akvoliverajn instalaĵojn oni funkciigas jam dum la konstruado, por kontroli la ĝustecon de la planoj



Sur la placo Marx en Budapeŝto oni preparas la kavaĵon por la plej granda akvotubo de la lando

akvoduktaro. La plej granda el ili estas la ĉefuzino de Káposztásmegyer, kie 4 maŝinejoj kapablas liveri sume 1 milionon da m³ tage; la uzino de Békásmegyer liveras tage 150 mil m³ da akvo.

La ĉefurba akvoproviza sistemo – konforme al la nivelaltecoj – konsistas el baza-zono kaj alt-zonoj. Por la lastaj la akvoprovizado okazas helpe de suprenigaj maŝinejoj aŭ pere de prempliigiloj el la baza-zono.

La akvon de la produktejoj la maŝinejoj tra ĉefpremduktoj liveras en la reton de la zonoj, en la kolektajn basenojn kaj en la suĉbasenojn de la altzonoj. Tia vasta sistemo de ĉefpremduktoj estis konstruita ambaŭborde de Danubo. En Peŝto (avenuo Váci) du akvoduktoj (NÁ) de 1200 mm jam dum 80 jaroj peradas la akvon de la nordaj produktejoj en la internajn distriktojn. La prospero de la ĉefurbo necesigis ankaŭ la trian ĉefprodukto-sistemon, por malŝarĝi la jam pli ol centjarajn du akvoduktojn (NÁ) de 500 mm – kiuj provizas ankaŭ la Internurbon. Ĝi havas la taskon liveri la bezonatan akvon por la nordorientaj kaj orientaj distriktoj, parte en la konstruatan suĉbasenon de Rákosszentmihály, parte en la basenaron de Kőbánya.

La rapide kreskantaj bezonoj ne haltis: necesas jam ankaŭ la kvara ĉefpremdukto en Peŝto, por interligi la nordon kaj la sudon, krome por plenigi la rezervujo-sistemon sur la Gellért-monto. La akvon de la nordaj produktejoj du (NÖ) ĉefpremduktoj de 800 mm transigas de la maŝinejo en Békásmegyer al la maŝinejo en Budaújlak kaj en la basenaron de Mez-Buda (Krisztinaváros), kiu servas kiel kontraŭprema baseno por la baz-zono en Buda, kaj kiel suĉbaseno por la altzonoj.

Sur la maldekstra bordo de Danubo la akvon de la du akvoprovizejoj ĉe Szigetszentmiklós liveras ĉefpremduktoj (NÁ) de 800, 650, 400 mm kaj 1000 mm (tiu ĉi parte sub fundo de Danubo) al la konsumantoj, respektive al la baseno „Gloriet" en Pestlőrinc.

En Buda, la altaj zonoj laŭgrade bezonas renovigon aŭ ampleksigon de la ĉefpremdukto-sistemo. Ankaŭ por Buda estas konstruataj samtempe ĉefpremdukto-sistemo (NÁ 1200 mm), pliaj produktejoj en Insulo Csepel, konekse malaltprema kondukilaro kaj nova maŝinejo en Szigetszentmiklós. Tiamaniere estos korektata la ĝis nun de nordo nesufiĉa provizado por la Sud-Buda regiono.

Por la ĉefurba akvoprovizado estas aparte gravaj la akvorezervujoj, basenoj, kies nemalhavebla tasko estas: dum periodo de eta konsumo rezervi, kaj okaze de ega konsumo kompletigi la necesan akvokvanton. La rapide kreskanta akvobezono prezentas vere malfacilan taskon por la Ĉefurba Akvoproviza Servo. Ekzemple antaŭ dek jaroj en la loĝkvartaloj tage 300 litroj estis la bezono por loĝejo, nun tio kreskas jam ĝis 4-500 litroj. La taga akvokonsumo de la ĉefurbo estas meznombre miliono da m³, kiu altiĝas dum la somera kulmino ĝis 1,1 milionoj m³.

Laŭ certaj taksoj la akvobezono de Budapeŝto ĝis la j. 2000 – surbaze de 2 250 000 loĝantoj – atingos la 1 820 mil m³. Al tio nepre apartenas rezervinda kvanto de 450 mil m³. Jam dum la nunaj jaroj la Servo devas konstruigi rezervujojn de ĉ. 240 mil m³.

Tiu zorgo jam manifestiĝas, ekzemple por la du rezervujoj po 40 mil m³, kiuj estas konstruitaj sur la norda deklivo de Gellért-monto, kaj jam funkcias, la unua de 1978, la dua de 1980. Unu kilometron longa ferbetona tunelo ligas ilin al la malnova rezervujo de 30 mil m³, ĉe la suda montdeklivo. Kun tiuj, la akvorezervo de la ĉefurbo atingas la 280 mil m³-jn. La du novaj rezervujoj ricevas akvon de Békásmegyer, Káposztásmegyer kaj Csepel, kaj plibonigas la akvoprovizon en Sud-Buda kaj en la Internurbo de Pest.

Oni povas kontente aserti, ke la Ĉefurba Akvoproviza Servo kiel bona mastro okupas sin pri la disponebla akvo, tiu trezoro, kiu jam vere ne troviĝas en senlima kvanto! Budapeŝto nuntempe jam de 40-50 kilometra distanco prenas sian akvon, kaj per multekostaj procedoj faras ĝin bonkvalita – kaj ĉio ĉi bezonas altiĝantajn sumojn. Moderna, komforta familia ekzisto postulas ĉiutage mil litrojn da akvo, do unu kubmetron – kaj por tio necesas investado de 35 mil forintoj!



La Surfaca Akvoprovizejo cerpas la akvon el Danubo.

Ankaŭ la kresko de la produktokostoj igas arda problemo la ŝparon de trinkakvo. La ĉefurbo trovis diversajn rimedojn tiucele. La industrio estas per la akva prezo instigata por ŝpari. La grandkonsumantaj entreprenoj ricevis kontingenton, kiun superante ili devas pagi grandan punon. El tiuj sumoj la Tutlanda Akvoafera Instanco donas subtenon al entreprenoj, kiuj investas por akvoŝparo.

El vidpunkto de akva ŝparo ŝajnas racie zorge atenti la agadon de industriaj entreprenoj, ĉar elinter la multan akvon postulantaj ekonomiaj brancoj la plej multon bezonas la industrio. Nuntempe la industrio uzas preskaŭ 60%-jn de freŝa akvo, konsumata de l' popolekonomio. Kiel tio kreskas, same kreskas la kloakakva volumeno en la industriaj uzinoj. Krome, la nocaj, poluciaj materioj penetrantaj en la naturajn akvojn, jam 75-80 procente devenas de la industrio!

La akvo-trezoro troviĝas nur en limigita kvanto, sekve ĝi bezonas racian mastrumadon, ankaŭ el vidpunkto de la ekonomia industria produktado. Konsiderante tion, la nuna stato de la industria akvomastrumado ne estas daŭrigebla: oni devas ĝin nepre transformi laŭ modernaj manieroj. Multflankaj disponoj, ekonomiaj, organizaj kaj ŝtataŭtoritataj, estas necesaj por atingi la dezirindan staton.

Akvoŝparo ĉe la loĝantaro

La Ĉefurba Akvoproviza Servo jam antaŭ 15 jaroj instalis sekcion kun la tasko: inspekti la ŝtatan loĝejaron en Budapeŝto por antaŭhelpi la akvoŝparon ĉe la loĝantaro. La inspektoroj ĉiujare alvenas unufoje en la opajn loĝejojn kaj tie kontrolas la akvokonsumajn muntaĵojn. Okaze de etaj difektoj ili tuj pretas – se la mastro mendas tion – ripari per la ĉemane troveblaj aĵoj kaj iloj. Se la mastro ne deziras tion, li/ŝi ricevas limtempon por riparo, post kio la kontrolantoj revenos konstati tion – sed oni spertis, ke la loĝantaro ĝenerale plenumas la devon.

Tiu agado montriĝis ege utila. Mezuroj pruvis, ke tra difektita muntaĵo ĉ. dekobla kvanto forfluas kompare al bonstata muntaĵo. Pro tio havas altan gravecon la faka kontrolo. Lastjara ekzameno elmontris, ke ĉ. 30-35 mil m^3 da akvo forfluis senbezone, do laŭvorte superfluis, en la loĝejoj. Se por tia volumeno oni volas konstrui akvoproduktilojn kaj kondukilojn, tio bezonus investon de 100-200 milionoj da forintoj! Do estas vere utilega la tiapseca agado.

Venonte tiuj ekzamenoj estos farataj ankaŭ ĉe entreprenoj kaj oficejoj, tute ne senmotive, ĉar tiuj konsumas 15%-jn de la Budapeŝta trinkakvo, kio signifas ĉ. 130-140 mil



Sedimentiga baseno en la Surfaca Akvoprovizejo.



La Rocla-tubo ricevas la ferringojn.

m³-jn. La ĝisnunaj provkontroloj montris, ke en hoteloj, lernejoj kaj aliaj publikaj domoj estas tre multe da difektitaj muntaĵoj, kiuj helpas forflui egan kvanton da akvo. Venos la vico ankaŭ al tiuj; baldaŭ la pliampleksigata inspekta sekcio estos kapabla plenumi ankaŭ tiun taskon, eĉ fari tuj la necesajn riparojn.

Antaŭfabrikitaj akvorezervujoj kaj naĝbasenoj

La Ĉefurba Akvoproviza Servo faras konsiderindan teknikan disvolvon apud sia normala tasko. En tiu kadro havas jam gravecon la patentita serio de akvorezervujoj. Tiuj estas konstruataj el antaŭfabrikitaj elementoj per post-streĉa procedo, kaj havas eminentajn hidrodinamikajn ecojn.

La akcela kresko de la rezervenda volumeno postulis, ke ties konstruado okazu rapide, do per industrieca teknologio, bonkvalita antaŭfabrikado kaj surloke prefere per muntado. La baseno-tipo, kiu estas kreita por trinkakvo-rezervujoj, estas kompreneble uzebla ankaŭ por aliaj celoj, ekz. por industriaj rezervujoj. Kelkaj el ties elementoj – post necesa modifo de la statika armado – estas bone adaptebla ĉe konstruo de diversaj akvujoj (cisternoj, akvoturoj, akvopurigejoj), ankaŭ ĉe subteraj konstruoj, kel-etaĝaj instalaĵoj (pumpilejoj, ferbetonaj kubframoj).

Tiu patento de la Servo pri la baseno-tipo kaj konstrua procedo estas tute nova afero en la monda tekniko. Inter ĝiaj avantaĝoj menciindas: pliboniĝas kvalito kaj uzodaŭro de la instalaĵo; ties konstruado forte rapidiĝas, kun grave malpli da laborhoroj; la konstrulaboro iĝas muntado, ebliganta plian mekanigadon kaj malpligon de peza korpa laboro, tiel la laborcirkonstancoj pliboniĝas, ktp.

Fabrikado de Rocla-tuboj

La Ĉefurba Akvoproviza Servo en sia Tubo-fabriko en Csepel jam de 1972 produktas per la procedo „Rocla" (pron. rokla) granddiametrajn ferbeton-tubojn sen streĉo. La licenco estis aĉetita de la firmo Dyckershoff kaj Widmann; la procedon „Rocla" inventis inĝenieroj Robertson kaj Clark en Aŭstralio, kaj ilia patento depost la 50-aj jaroj disvastiĝas en Eŭropo.

La transprenon de la licenco kaj la disvolvon de la tubfabrikado necesigis la ade kreskanta akvobezono de Budapeŝto. Pro tio la akvoproduktejoj pli kaj pli malproksimiĝis sur la insuloj Szentendrei kaj Csepel – ili servas ja kiel naturdonitaj, akvon produktantaj areoj por Budapeŝto. Do la akvon oni devis tra pli kaj pli longiĝanta distanco konduki al la gravaj konsumlokoj. Por tiu celo oni devis dum kelkaj jaroj konstrui 40-50 km-jn de granddiametra akvodukto, kaj tia ega laboro neniel estis plenumebla per la tradiciaj kavofosaj konstru-metodoj. La projektita akvoduktaro devis elteni normale premon de 2 att laŭ la kalkuloj.

Estis do bezonate aĉeti tiajn farmetodon kaj instalaĵon, per kiuj la supraj taskoj estas plenumeblaj. La Servo, post ekzameno de pluraj, ankaŭ eksterlandaj metodoj, konkludis, ke por disvolvi la malaltpreman duktosistemon pleje konvenas la ferbetontubo laŭ sistemo „Rocla", kaj aĉetis ties licencon. Tiu fabriksistemo kunigas la rotacian kaj laminatan procedojn.

La spertoj de la loĝantaro pruvas, ke la laboruloj de la Ĉefurba Akvoproviza Servo sindediĉe kaj fakscie plenumas sian gravan agadon, tiel kontribuante al la kontinua progreso de tiu perlo Danuba, de Budapeŝto.

Trad. E. *Fenyvesi*

Gábor Thurzó

La mapo de steloj

Troviĝis en la ĉambro de mia avino – en purpura pluŝkadro – mapo de steloj. Mistera, ronda plato, sur malhelblua firmamento la stel-konstelacioj: etaj, lanugaj stelgrupoj, solece brulantaj noktaj vagantoj, la blanka fumo de la Lakta Vojo. Mi timis la mapon de la steloj, tamen ofte mi aliradis ĝin. Estis kelkaj knabaĝaj jaroj, kiam mi senĉese troviĝis sub la magia forto de la mapo de steloj. Eĉ se mi ne vidis ĝin, mi pensadis pri ĝi kaj sentis certaspecan neniiĝon, mi ne sentis mian realecon.

Se mi pensis pri la mapo de steloj, mi provis perdiĝi inter la steloj aŭ flugilumi tie kun ili. Tiu ĉi mapo de steloj estis mia unua timo, nur longe poste sekvis ĝin la ceteraj. Ĉu mi povus jam tiutempe percepti, ke ne la ĉielo estas la granda tentado, ne ĝin mi devas pritimi, sed tion, kio estas mi mem: interplektaĵo de nervoj, ĉeloj, instinktoj, pasioj? Kaj nur iom post iom mi malfermiĝis kaj ellernis trovi en mia memo la rondirantan mondon. Sed tion mi ja kredas esti tiel nur nun, post forpaso de homlonga vivo. Tie, antaŭ la mapo de la steloj, mi ankoraŭ ne kapablis nomi la timon, la angoron. Knabo mi estis, eĉ etulo, ankoraŭ mi luktis kontraŭ praaj monstroj, eĉ tion sen konscio.

Poste, dum vintra nokto, mortis mia avino. Ŝi agoniadis en la stratflanka ĉambro, maldorme kaj sobre. Tie ni sidis, ni atendis sub la mapo de steloj, torporiĝintaj de dormemo, vane volis nin ĉiujn – triope ni tiam ankoraŭ estis – nia patrino peli en la liton. Kvazaŭ ni atendis por ke ni povu iĝi atestantoj de la forpaso, kvazaŭ ricevi tion anticipe por nia komenciĝanta vivo. La morto alvenis malrapide. Tie mi sidis, kontraŭ la granda murspegulo, mi vidis la parencojn, vidis min mem, mian dormeman kapon. Kaj subite, tiel, ke mi timiĝis – ĉar mi ja tion ne konjektis – mi ekvidis en la spegulo, super mia kapo, la mapon de steloj. En la salono – tie ĉi ni sidis – lumetis unusola flava elektra lampo, la glimeroj de la mapo de steloj ek-ekbriletis, se iu ekstaris kaj eliris, aŭ revenis kaj sidiĝis, kiel kutime dum tia vigilado, kaj per tio oni jen kaŝkovris, jen denove videbligis miajn stelojn.

Frumatene, je la kvara nia patrino fine haltis ĉe la pordo de la agonianto. Ŝi ne plu ploris, nur pala ŝi estis. Eĉ nun mi aŭdas ŝian sekan voĉon:

– Ĵus ŝi mortis.

Kio poste sekvis, tion mi apenaŭ rememoras. Sinjorino Doboŝ, la akuŝistino el la domo, alportis lavkuvon, plenan je vinagra akvo, helpis al ŝi fraŭlino Hermina, la ĝibeta kudristino de la familio kaj eble Elizabeta ankaŭ, nia kelkjare pliaĝa kunludantino, kiun oni tial nomis Etelizabeta, ĉar en la familio estis jam tro da Betinjoj, Elizabetoj kaj Elinjoj. Ili nun eniris al la mortinto. Nia patrino sidiĝis inter ni. Subite vekiĝis en ŝi tiu amo, kiu ĵus perdis sian sencon, sed nun ne plu koncerne nian avinon, sed nin, ŝiajn infanojn, kaj per tiu ĉi amo, iom orfe, ŝi tiris al si nin ĉiujn tri, kaj ni alpremiĝis, ek-ekdormetante en tiu ĉi koveja varmo. Ŝi eĉ ridetis, vidinte la paperbestetojn sur la tablo, niajn ludaĵojn. La ĉambro komencis nun ŝanceliĝi, la vizaĝojn mi ne plu vidis klare, kaj poste, kiam mi vekiĝis en la sino de mia patrino, mi petis, ke ŝi montru mian avinon. Ŝi prenis min ĉemane, enkondukis min al la mortinto kaj en la duonlumo, kvazaŭ tra fumo, mi alrigardis dum momento la vakse flavan, rapide blankiĝantan vizaĝon, sur la blanka hararo la papilian puntkufon.

Kiam ni revenis hejmen post la entombigo, nin atendis ŝanĝiĝinta loĝejo. En la ĉambron de nia avino enbrilis la suno, ĉio estis hela, oni deprenis la mistere sombrajn drapiraĵojn, de sur la tegmento de la kontraŭa domo gaje, blindige albrilis la neĝo, en la forno ekscite flirtis la fajro.

Kaj nenie mi trovis la mapon de steloj. Ĝi malaperis, oni forigis ĝin, eble ankaŭ ĝin kunprenis la morto.

Kiom da jaroj pasis depost tiam? Pli bone, ne pensi pri tio. La juneco forpasas tiom rapide, nur dum ĝi daŭras, ni sentas ĝin eterna, nedamaĝeble konstanta. El la spegulo de miaj jaroj rerigardas al mi jam iu alia ol tiu, kiu primiris kaj timis la mapon de steloj. Ĉiam ankoraŭ mi vivas en la familio, eĉ deziras vivi ĉi tie, sed el inter la malnovaj ĉambroj unu, tiu, kie mia avino mortis, estas jam nure la mia. Ĝi estas aparta tereno, kaj eĉ aparta mondo, ĝi ne plu similas la ceterajn ĉambrojn. Mi posedas mian apartan malordon, kiu tiel beie reprezentas por mi la ordon. En angulo brilas staranta lampo kun amika lumo. Komence ĝi surhavis silkan ŝirmilon, tia mi ricevis ĝin de mia patrino. Poste ŝi ŝanĝis ĝin, iun kristnaskon mi ricevis novan lampŝirmilon; sur la nova ŝirmilo estis mapoj, misdesegnitaj, kopiitaj el malnovega atlaso: Aŭstralio, kiel stranga spongo, Hindujo, kiel karia dentego, kaj Eŭropo ankaŭ ne estas rekonebla, nur sur ĝia supro, la dormema leono, Skandinavio, kaj sube la spronita boto: Italio. Mi alkutimiĝis al la mapo, neniam mi rigardis ĝin de proksime, nenion mi ja estus trovinta sur sia ĝusta loko, nek unusolan montoĉenon, nek riveron. La grava estis la lampo, la lumo, kaj tio kion ĝi signifis: la trankvilo.

Post jaroj mi haltis foje antaŭ la lampo, mi serĉis malantaŭ ĝi iun libron sur la breto. Kaj por momento mi konfuziĝis, kvazaŭ tie, sur la ŝirmilo estus brileginta la bildo de la stela firmamento, la mapo de steloj mem. Tutcerte ĝi ne estis tie, neniam plu mi vidis ĝin, ja eĉ ne eblis vidi ĝin. Sed tiam, dum peza horo, ĝi ankoraŭ reaperis. Mi rigardis la taŭzitan ordon de la steloj, kaj ĉio malaperis ĉirkaŭ mi. Mi ŝvebis, kiel en mia infanaĝo en la teruregaj kaj nekomprenebla neniego. Ĉu min kaptis dubo pri la ekzisto, ia konsterna sensencaĵo, kiun oni povas senti tiam, kiam oni mem apartenas ankoraŭ al la sekreto – estante etulo? Ĉio, kion mi minŝirme surprenis el travivaĵoj,

spertoj, felicˆo kaj malfelicˆo, malaperis. Mi staris tie, nude alfrontante la absurdon, la nenion. Kaptis min la sama kapturniĝo, kiel en la salono de mia avino, kaj la sama senpovo. Subite mi perdis cˆion, kion mi pene akiris, mi rigardis la figurojn de la steloj kaj malantaŭ ili la timigan senfinon. Kaj mi ekpensis tiam, ke mi ne sˆanĝiĝis, mi restis la sama, cˆar ankaŭ la timo estis la sama, same malcerta, kapturna kiel en mia infanaĝo.

De sur la strato min alarmis la sonoregado. Pace ĝi alrampadis de la cˆeangula preĝejo tra la muroj. Ekstere mallumiĝadis, komence estiĝis nigra, ne trapenetrebla neniaĵo sur la loko de la firmamento, kaj poste kvazaŭ mano de grandegulo supersˆutus ĝin per arĝentaj najletoj, ope ekaperis la steloj. Kaj la mapo de la steloj malaperis, tiam mi vidis ĝin la lastan fojon, ĝi aperis neniam plu.

Oni frapetadis, oni vokis min al vespermanĝo. En la manĝocˆambro agrable lumis la lampo. Cˆirkaŭ la tablo la malnovaj vizaĝoj, mia patrino kaj miaj gefratoj. Mia patrino metis viandon sur mian teleron, kaj ankaŭ mi komencis malrapide manĝi.

– Cˆu vi ne prenas el la salato? – demandis mia patrino.

Senvorte mi obeis. Oni alparolis min, ni babiladis, precize kaj sobre mi respondadis, je kio mi volis respondi, sed tamen el iu kapturna malproksimo. Kiam oni alportis la deserton, tiu cˆi malproksimo jam iomete klariĝis, mi jam vidis la realon, ĝi estis tusˆproksime. Mi sentis jam nur etan piksimilan angoron, sed tiu cˆi angoro eˆ poste ne forlasis min, ĝi nur iel malfortiĝis, sed sˆvebis senˆcese en mi. Poste oni malplenigis la tablon.

– Kio okazis al vi? – demandis mia patrino.

– Nenio – mi diris.

Sˆi ne plu demandadis, sˆi volis scii nur tiom, kion ni komunikis al sˆi. Kaj kiom mi povis diri.

... Poste mortis ankaŭ mia patrino. Vigilado, sed jam en sobra, frumatena lumo. Kiam oni entombigis sˆin – eˆ mi mem ne scias, kial – mi ekpensis pri la mapo de steloj. Mi decidis, ke mi serˆcos ĝin, ĝi devas esti tie en la loĝejo, ie en la subtegmentejo, en la kelo. Sed malgraŭ tio mi ne ekserˆcis ĝin, mi ja sciis, nenie ĝi jam troviĝas. Nur tio konsolis min, ke ĝi povas troviĝi ie subtegmente, en la kelo, inter malutilaĵoj en iu sˆranko, kaj estas bone, ke mi havas la sˆancon iam retrovi ĝin.

El la hungara: László *Mauksinszky*

Violono savita el fajro. Ilustraĵo de István Fejes

Zoltán Zelk (1906–1981)

Violono savita el fajro

Per violono flammordita
kion fari, povra cigan'?
Cˆu vi magios kanton per ĝi,
cˆu adobon formos la man'?

Trezoro via frakasita,
ligno karba, pendas la kord',
sed provu, eble ĝi eksonos
dum l' amara, plora agord'.

Cˆu kordoj sˆnure riparitaj?
tamen eble! provu povrul',
ceteron se ne, por ĝemplori
la minuton de l' kabanbrul',

kiam pepante furioze
la freneza hirundopar'
por savi siajn idojn
flugas al tegmento-flamar',

kiam vi hojlis kun la hundo
la pereon – en mondeksterm'
ke grincu via cigansorto
kun la praa kanisa trem'!

Tion priarˆcu, cˆi-minuton,
poste dormu ĝis la malsat'
vin dormi lasas, ĝis l' oldiĝo,
ĝis la sterko-, koto-sˆprucad',

en argilkav' vi nostalgios
pri pasinta lud' kun angor',
memor' surfalos vin flugcindre
kaj dikiĝos fulg' sur la kor'...

El la hungara: Imre *Szabó*

Szilárd Bálint

Altirforto de la mono

Meze de la vilaĝo oni konstruis domon. La muroj jam staris, sed la konstruado ankoraŭ ne estis preta. La varmaj sunradioj trabrilis la aeron, kaj pro la varmego la masonistoj kun la helplaboristoj ofte trinkis bieron.

– Kara Jozefo, vi povas denove malfermi vian monujon, ĉar rapide malmultiĝas la konstrumaterialo – diris rikane la konstrumajstro.

– Estu trankvila, ĉio estos en perfekta ordo... Mi atendas ricevi sufiĉan monon por plenumi ĉion...

Post la sunsubiro Jozefo kun la edzino hejmeniris. Dum la vespermanĝo en la malnova argilbrika dometo regis inter ili angora sento. Unue ekparolis la edzino:

– Kial vi asertis, ke ni havos sufiĉan monon? Vi ja bone scias, ke ni ne povas jam ricevi prunton, por ni kreditas neniu! Ni devas portempe ĉesigi la konstruadon!

Jozefo respondis nenion. Ĉirkaŭis ilin la prema zorgo. Li estis poŝtisto, laboris ĉe fervoja poŝtvagono. Tie kun aliaj poŝtistoj li zorgis pri ekspedo de leteroj, monaj kaj valorpaperaj sendaĵoj. Li laboris alterne en tagnokta deĵoro, post 12-hora deĵoro li ricevis 24-horan libertempon.

La postan tagon li laboris en la kutima pasaĝer-trajno kune kun du poŝtistoj. Sur la manipula tablo ili selektadis la leterojn, la aliajn sendaĵojn, kaj metis ilin en la konvenan fakon. La trajno kuregis monotone. Intertempe ĝi haltis ĉe stacioj, kie la poŝtistoj transprenis kaj transdonis sendaĵojn. Ĉio estis en bona ordo.

Alveninte Budapeŝton, dum la denombrado oni konstatis, ke el iu sako mankas dekmil forintoj. La poŝtoficistoj protokolis, la policistoj faris priaŭskulton, sed senrezulte. Dum tri tagoj daŭris la kontrola enketo, tamen montriĝis nek spuroj, nek klarigoj pri la monmanko. Fine oni absolvis la tri poŝtistojn, konsiderante ankaŭ tion, ke ĝis tiam ili korekte laboris.

En la poŝtvagono dum la respondeca kaj malfacila laboro la tri poŝtistoj kun suspekto rigardis unu la alian, kaj ofte parolis pri la mistere malaperinta mono. Dum monato okazis nenio.

Intertempe Jozefo ricevis novan bankkrediton, kaj mastrumis la monon tiamaniere, ke li povis daŭrigi la konstruadon. La edzino de Jozefo kelkfoje demandis lin pri la mono, kiu malaperis en la poŝtvagono, sed la edzo ĉiufoje iĝis tre kolera:

– Lasu min trankvila! ... Mi scias nenion!

Pasis la tempo. Iun tagon aperis detektivo ĉe la konstruado, kaj li volis paroli kun Jozefo. Ili hejmeniris, kaj Jozefo kompleze montris ĉiujn dokumentojn pri siaj ricevitaj monoj. La detektivo foriris.

La tri poŝtistoj laboris plu. Foje ili ĉe iu eta stacidomo transprenis poŝtan sakon. En ĝi estis – laŭ la rubrika papero – aparta saketo kun centmil forintoj, per plumbosigelo fermita. Tiun oni devis transdoni al poŝtistoj ĉe la sekva urbo.

Kiam oni volis prepari la monsaketon por tiu transdono, Jozefo konsternite ekkriis:

– Mankas la mono! !

Ili tuj komencis serĉi la monsaketon sed ĝi nenie estis trovebla. Laŭ la regularo, el la sekva stacidomo ili tuj devis sendi tri telegramojn al la kompetentaj oficejoj. Jozefo kaj Georgo laŭ ofica devo plenumis tiun taskon, dume Stefano gardis la poŝtvagonon.

En Budapeŝto jam atendis la trajnon komisiono, kiu ĝisfunde reviziis la tutan vagonon, sed sen rezulto. Komenciĝis ankaŭ la polica priesploro. Estis certe, ke inter la vilaĝa poŝtoficejo kaj la eta stacidomo la mono ne povis malaperi, ĉar en la poŝtaŭto gardis policisto, kaj la plumbosigeloj estis sendifektaj, kiam oni transdonis la sakon ĉe la poŝtvagono.

La suspekto direktiĝis al la vilaĝa poŝtestro, kiu ne estis certa pri tio, ke la monsaketo estis vere enmetita en la sakon. Poste estis supozeble, ke la monsaketo eniĝis en alian poŝtsakon, ĉar samtempe estis preparita ankaŭ sendaĵo, direktita al alia urbo, kies pakadon ne mem la poŝtestro faris. Tamen la mono ne estis trovebla en tiu alia urbo, do oni provizore eksigis la vilaĝan poŝtestron.

Poste iu policoficiro pensis pri tio, ke unu el la tri poŝtistoj elĵetis la monon tra la fenestro el la trajno. Dum tiu tempo la tri poŝtistoj estis arestitaj, kaj aparte aŭskultitaj. Georgo kaj Stefano asertis, ke ili vidis Jozefon, kiam li dumvoje ĵetis tra la fenestro diversajn pakaĵojn. Jozefo konfesis, ke li vere faris tion, ĉar lia manĝaĵo malboniĝis en la granda varmeco. Fine ili neadis ĉion pri la malapero de la mono.

Dumtempe la ĉefpolicejo donis ordonon per radio al ĉiu preterfervoja policejo, por serĉi la monsaketon ambaŭflanke de la reloj. La postan tagon la tuta mono estis jam en la policejo.

El inter la tri poŝtistoj Georgo restis arestita, sed Jozefo kaj Stefano liberiĝis el la provizora arestado...

Kara Leganto! La redakcio petas vian helpon por mallonge fini la historion. Ni scivolas: kiel eksciis la policoficiro, ke Georgo estis la kulpulo? Bonvolu sendi ne pli ol 30 tajpitajn liniojn. La plej bona solvo ricevos libropremion, kaj la teksto aperos en Hungara Vivo.

DAŬRIGO

de la historio

LA SORTO DE LA BANKRABISTO

aperinta en n-ro 1980/5

Ĝia aŭtoro estas Nina Titova, Moskvo, al kiu ni la premion jam alsendis.

Ĉi foje la advokato sukcesis kaŝi sian konfuziĝon. „Vi starigis min – li diris – en tre ĝenan situacion. Mi petas du horojn por pripensi vian proponon. Poste ni renkontiĝos ree, kaj mi informos vin pri mia decido."

Je la fiksita horo ili denove sidis ĉe la tableto de la kafejo. La advokato trinkis sian kafon, kaj komencis:

– Mi refoje tralegis la dosieron de mia pledito, kiu estas cetere via edzo... kaj mi ree konvinkiĝis, ke mi prave gajnis la proceson. János Kis ne estas kulpa! Ĉar... la krimon faris *vi mem*, sinjorino!

Kaj ne atentante pri la paliĝinta virino, li daŭrigis:

– Por eviti la senmaskigon, vi kaŝe direktis la suspekton al via edzo,

ORIGINALA POEZIO

N. Danovskij

Puŝkin kaj aŭtuno en Esperantujo

Admiris Puŝkin buntajn ĉarmojn de aŭtuno...
Lin ravis pompo de l' naturo-forvelkad',
surprizis la palanta fade suno
kaj antaŭĝu' de blanka neĝblokad'

de l' mort' poeta ĝis ekĝermo Esperanta
trakuris kvindek jaroj de tempest'.
Samtempas kre' de monument', sur plac' staranta,
kun de l' unua pri novlingva skrib' ekest'.

Unua verko de l' beletro instalata
denove estis de la bardo glora vort'.
Averte kvazaŭ sonis en la „Neĝblovado"
malfacilafoj en la lingva sort'.

Sed redorlotas Esperanton sinforgese
aŭtunoj de la Orienta Globduon'.
Signal' ilia ĉiujaras novpromese
pri la aŭtuna fintriumfa kariljon'.

Euclides Carneiro da Silva

Malrapidiĝu!

Vi bezonas silentiĝi dum momento
por aŭskulti la sekreton de la lumo,
por diveni la pensojn de la floroj,
por surprizi la intencojn de la suno!

Vi vojiras tro rapide!
Malplirapidiĝu!
Paŝante tiamaniere, mi timigos la semojn,
vi teruros la radikojn! ...

Kial vi diskuras tiele?
Ĉu vi volas ĉirkaŭbraki la arbarojn?
Ĉu vi volas prikisi la marojn?
Ĉu vi forperdiĝis en la tempo?
Ĉu vi volas kapti stelon?
Ĉu vi volas deigi la nokton
en la direkto al nenio?

Kurante tiel rapide,
vi ne ekvidos, ke
mi estas ĉe via flanko,
kune kun viaj homfratoj,
penante renkontiĝi kun vi.

Kurante tiel rapide,
vi ne rimarkos, ke
mi estas tre proksime de vi,
invitante vin por sidiĝi kune kun mi
sur la dekstra flanko de la vivo,

kie la sunsubiro renkontiĝas kun la aŭroro,
kie la nokto renkontiĝas kun la tago,
kie la doloro transfiguriĝas en la homa koro!

Julio Varga

Du arboj

L' unua
deŝiris vestojn, senkompata estis,
skrapvundis brute manojn kaj vizaĝojn,
elpikis eĉ okulon. Kiam fine
elhakis ĝin fervoraj laboristoj,
el ili unu sub ĝi morta restis.

L' alia
al bird' azilon kaj nestejon donis,
brancetojn al la knaboj por la ludo,
toleris milde ĝi, se geamantoj
gravuris en la krusto koron, nomon;
eĉ tion, ke arbohakistoj pere
de ĝia morto perlaboru monon. –

Kaj tamen:
pretiĝis el l' unua pompa meblo;
l' alia en kamenoj febre – brulas...

Eksonas triste super ĝi funebra
parol' – kaj pri amara spert' atestas –
„Gefratoj, jen la viv' ĉi tia estas."

Aldo de' Giorgi

Senpersoneco

Mi estas luno
helanta nur per lum'
reflekta.
Mi estas planedeto
kies respegulita brilo
neniun blindigas.
Mi estas voĉo
reeĥanta mistembre
sonojn de aliaj.
Mi estas koro
pasive ploranta
pro aliesaj trompoj
senelire.

komprenante perfekte, ke la krimpruvoj kontraŭ li – modesta bankoficisto – estas ne sufiĉaj, kaj li estos absolvita. Sed paginte al mi tian „fantastikan" honorarion, vi elpensis novan malican planon: helpe dè ĉantaĝo atingi de mi revizion de la verdikto.

– Tiamaniere – levis pli alten sian voĉon la advokato, tamen bremsante la koleron – vi volas „per unu frapo kapti du leporojn". Unue – malliberigi vian edzon, kaj tiel sendanĝeriĝi de li, ĉar eksciante kian grandan sumon ricevis lia advokato, li povus konjekti, kiel vi akiris tiun monon! Due – vi volas akiri firman situacion en la socio, edziniĝante al prospera advokato kun via granda „doto".

– Sed rakontinte pri ĉiuj detaloj de la bankrabado, vi mem donis al miaj manoj vian armilon. Kaj vi ne povos informi tribunalon pri la „krimo" de via edzo, ĉar mi nun rekonstruis la tutan krimbildon – do, mi scias, kiu estas la vera krimulo! Same nenion vi diras al via edzo pri nia interparolo, por ke en lia opinio vi restu pura kaj senkulpa.

– Nun vi komprenas, sinjorino, ke via plano fiaskis. Jes, ne vane oni diras: „kiu fosas kavon por aliulo, enfalos mem! "

malmultekosta, bongusta novaĵo

HOT-DOG

KOLBASO

48 Ft/kg

HÚSIPAR

Reĝo Anaso kaj reĝo Rimeno[1]-ŝuo en Kaserolo[2]-urbo



Bulgara popola fabelo

Foje, Petro la Ruza pelis leporon[3] en arbaro. La leporo kuris pli kaj pli internen, sed Petro la Ruza restis ĉiam sur ĝiaj postsignoj. Finfine, la leporo alvenis al lago, volis transsalti ĝin, sed enfalis kaj sufokiĝis[4]. Petro la Ruza iĝis tre malĝoja. Li ĉirkaŭrigardis kaj vidis, ke li estas en la plej meza mezo de la arbaro. Kiel trovi vojon por eliri?

Li ekiris laŭhazarde. Li pensis, ke li eble trovos domon por tranokti, kaj ke li povos iri hejmen en la sekva tago. Li iris, iradis, ĝis li trovis solecan domon.

En la domo estis virino.

«Dio donu al vi bonan tagon!», li salutis ŝin ĝentile.

«Bonan tagon ankaŭ al vi!», diris la virino. «Kion mi povus fari por vi? »

«Mi perdis la vojon en la arbaro», diris Petro la Ruza. «Mi petus dumnoktan restadejon, se vi kompatus min.»

«Ankaŭ por vi estas loko», respondis la virino. «Mia edzo baldaŭ venos hejmen de la kamparo. Ĝis tiam sidadu sur la benko antaŭ la domo; mi havas multan laboron.»

Petro la Ruza eksidis sur la benko kaj atendis. Baldaŭ li flaris[5] palato-karesajn[6] odorojn, enrigardis en la domon, kaj li vidis, ke ege granda anaso estas kuirata en la kaserolo.

«Estos bonega vespermanĝo», li pensis kaj lekis[7] al si la lipojn. Dume la anasaĵo iĝis manĝopreta. La virino metis la kaserolon en angulon de la kuirejo, kaj ŝi kovris ĝin per fermoplato.

«Certe ŝi kovris ĝin, por ke ĝi restu varma», opiniis Petro la Ruza.

La mastro alvenis de la kamparo. Ili salutis unu la alian kaj altabliĝis. La dommastrino metis sur la tablon cepon[8] kaj panon. Petro la Ruza miregis, ke la dommastrino komencas la bongustan vespermanĝon per cepo.

Subite, la virino ekparolis:

«Sciu, edzo mia, ke mi ne havis tempon por kuiri vespermanĝon; tial ni devas kontentiĝi per cepo.»

La dommastro ne respondis. Sed Petro la Ruza komprenis, ke la virino kaŝis la anasaĵon. Li diris nenion; li nur plumanĝis kaj iom babilis kun la geedzoj.

Post kelka tempo, ili finis la manĝon, kaj sin preparis por iri en la liton. Dum Petro la Ruza havis kuŝejon en la kuirejo apud la fajrujo, la du geedzoj iris en la dormoĉambron, kaj, baldaŭ ili ekdormis.

Petro la Ruza atendis nur tion. Li kaptis la anasaĵon el la kaserolo, manĝis la duonon, kaj kaŝis la alian duonon en sia sako. Ĉe la fajrujo, estis rimenoŝuoj, kaj li metis ilin en la kaserolon. Poste ankaŭ li endormiĝis.

En la sekva tago, ĉiuj tri elitiĝis, altabliĝis kaj matenmanĝis. La mastro demandis al Petro la Ruza:

«Kiel vivas, ĉe vi, la popolo? »

«Nu, ni vivas bone», respondis Petro la Ruza. «Ni havas urbon, kiu havas la nomon de Kaserolo-urbo. Dum la reĝo Anaso regis la urbon, unuj vivis bone, kaj la aliaj malbone; sed de kiam, regas la reĝo Rimenoŝuo, bone vivas kaj la orfoj[9] kaj la malriĉuloj!»

La mastro ne komprenis la vortojn de la gasto.

Post matenmanĝo, Petro la Ruza dankis al la geedzoj kaj foriris.

La virino atendis nur tion. Ŝi kuris en la domon, levis la fermoplaton kaj ekmiregis; anstataŭ anasaĵon, ŝi vidis rimenoŝuojn en la kaserolo.

Ankaŭ la mastro vidis ĉi tion, kaj li tuj komprenis, kial la fremdulo parolis pri reĝoj Anaso kaj Rimenoŝuo. Li kolere diris:

«Vi meritas tion! Neniam kaŝu la manĝaĵon de antaŭ la gasto!»

Reverkis kaj tradukis:
István *Takács*

(El „Juna Amiko")

1. rimeno: ŝnuro el bestohaŭto / 2. kaserolo: vazo por kuirado / 3. malgranda longorela ĉasbesto / 4. sufokiĝi: morti pro manko de aero / 5. flari: senti per la nazo / 6. palato: plafono de la buŝa kavo; karesi: tuŝi agrable / 7. leki: ŝovi la langon sur io / 8. subtera dikiĝinta parto de legomo / 9. filo, kies gepatroj mortis.

Realo kaj idilio

Zsigmond Móricz: Ĉiela birdo. Tradukis: d-ro István Nagy. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. 1979. 41 p. 20 cm. Prezo: 8,10 ned.gld.

La literaturo de ĉiu popolo estas fenestro al la historio, kulturo, kutimoj, animo de la popolo. Oni ne povas bone ekkoni iun popolon, se oni ne konas ĝian originalan literaturon aŭ pli ĝuste, se oni ne konas la verkojn, kreitajn de la plej elstaraj verkistoj de tiu ĉi popolo aŭ nacio.

En la jaro 1977, kiam mi ekloĝis en Hungario, Hungara Esperanto-Asocio eldonis poemaron de Endre Ady „La morto de la ĉielarko". Tiu ĉi poeto, kiun mi ne tre bone konis antaŭe, impresis min per sia originala talento kaj profunda racia filozofio, kaj mi opinias, ke li estis la unua, de kies kreado mi eksentis la ĉefajn trajtojn de la hungara popolo.

Du jarojn poste, en 1979, Hungara Esperanto-Asocio eldonis la etan romanon de Zsigmond Móricz „Ĉiela birdo" Mia intereso al Zsigmond Móricz estis natura, ĉar en „Hungara Vivo" mi jam legis liajn novelojn, kaj mi tre bone memoris lian rimarkindan novelon „Sep krejceroj" per kiu li, 29-jara vekis la intereson de la hungaraj legantoj.

Se Endre Ady montris al mi la psikologion de la plej honesta kaj progresiva tavolo de la hungara inteligentularo antaŭ la unua mondmilito, Zsigmond Móricz malkovris antaŭ mi la vivon, la sorton, la grandajn problemojn kaj konfliktojn en la hungara vilaĝo antaŭ la unua mondmilito.

„Ĉiela birdo" ne estas la ĉefverko de Zsigmond Móricz, sed ĝi respegulas la talenton de tiu ĉi hungara klasikulo. Móricz ne nur bonege kaj profunde konas la hungarajn kamparanojn, sed li spertas talente kaj drame priskribi ilian mizeran vivon. Móricz analizas la konfliktojn, kiuj estas karakterizaj por la hungara vilaĝo, en la periodo de la unua mondmilito. La aŭtoro strebas profunde penetri en la akrajn sociajn problemojn. Móricz vipas la klason de la riĉaj kamparanoj, kiuj per sia mono ne nur regas, sed ankaŭ „aĉetas" la homojn. Tiel, riĉa kamparano havas belan junan edzinon, ĉar la mono donas al li aŭtoritaton kaj potencon.

Sed „Ĉiela birdo" estas ne nur reliefa bildo de la kritika realismo. La romano havas ankaŭ idilian tonon, kiu estas esprimita en la personecoj de Panni kaj Miska, en ilia instinkta protesto kontraŭ la riĉuloj, kontraŭ la kruela milito. De Panni kaj Miska radias optimismo, simila al ĉiela birdo, optimismo kiu levas la du ĉefajn heroojn super la mizera vivo.

Móricz posedas riĉan elokventan stilon kaj li estas majstro de la dialogo. Ne hazarde „Ĉiela birdo" havas ankaŭ draman varianton.

Mi opinias, ke d-ro István Nagy talente tradukis tiun ĉi valoran verkon de la hungara klasikulo.

En la mondo de la hungaraj fabeloj

Elek Benedek: Hungaraj fabeloj. Elektis kaj tradukis: Maria Benczik. Ilustraĵoj de Ida Csáky. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio. 1979. 70 p. 20 cm. Prezo: 10,20 ned.gld.

Eble eksterlande oni preskaŭ ne konas la nomon de la hungara verkisto Elek Benedek (1859–1929). Li estis ĵurnalisto, sed lia ĉefa verko estas „Hungaraj fabeloj kaj legendoj", kiu aperis inter 1894–1896 en kvin volumoj. Elek Benedek prilaboris kaj literature rekreis multajn fabelojn kaj legendojn de la hungara folklora trezoro.

La fabeloj de Benedek ankaŭ nuntempe estas ŝatata legaĵo ne nur de la hungaraj infanoj, sed ankaŭ de la plenkreskuloj, ĉar tiuj ĉi fabeloj estas tuta mondo, kiu ravas la legantojn per sia humoro kaj homeco. Eble ĝuste tio igis la tradukintinon interpreti en Esperanto dek fabelojn de Benedek kaj prezenti ilin en la ĉarma libreto „Hungaraj fabeloj".

La eksterlandanoj preskaŭ ne konas la hungaran folkloron, sed dank' al „Hungaraj fabeloj" ili povas ricevi imagon pri la riĉa fantazio kaj freŝa humoro de la hungara popolo. Ĉiu fabelo havas edukan celon, sed en la fabeloj de Benedek tiu ĉi celo estas prezentita en alloga literatura formo.

Unu el la unuaj libroj, kiun Zamenhof tradukis en Esperanto, estis la fabeloj de H.C. Andersen, kaj nun, jen, tiu bela tradicio estas daŭrigata. Ni ne devas forgesi, ke, se ni deziras ekkoni iun popolon, ni devas bone koni ankaŭ ĝian folkloron.

„Hungaraj fabeloj" estos agrabla legaĵo por ĉiuj esperantistoj, kaj ni nur bedaŭras, ke tiu ĉi bonega libro ne estas pli granda, sed ni esperas, ke ĝi ne restos sen daŭrigo, ja la mondo de la hungara fabelaro abundas je riĉaĵoj.

Georgi *Mihalkov*

Mirindaj dialogoj

A. Lienhardt: Amuzaj dialogoj. 20 dialogoj por progresigaj kursoj. Karikaturе ilustrita. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1980. 141 p. 24 cm. Prezo: 13,80 ned. gld.

Dum la lastaj jaroj mi sufiĉe multe okupiĝis pri instruado de Esperanto al plenaĝaj personoj. Mi jam elprovis kelkajn metodojn, ankaŭ la popularan „strukturan". Nun mi povas diri: tutcerte, ĉiuj metodoj estas bonaj, krom la enuiga. Kaj plej fore de la lasta speco vi estos, se vi uzos, kiel paroliga lernomaterialo „Amuzajn dialogojn en Esperanto" de Albert Lienhardt (HEA, 1980). Ĉi tiu dialogo-libro prezentiĝas al ni kiel izolita helpilo, kiun oni povas uzi en dua-gradaj E-kursoj (laŭ intenco de la aŭtoro), post ajna lernoprogramo en unua-gradaj kursoj, sed kiel fina paroliga ĉenero ĝuste post „Ĉu vi parolas Esperanto? " de Andrzej Pettyn, uzebla en la komenca kaj mezgrada etapoj. La du lernolibroj en io esence similas unu al la alia, kaj, tiamaniere, konsistigas naturan sinsekvon, metodike. Antaŭ la „Dialogoj" oni devas tralerni

AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO

„Ĉu vi parolas Esperante? ", sen ties gramatika parto, kiu jam devus esti bone konata, samkiel multaj vortoj – por ke dum paroliga etapo oni okupiĝu pri parolo, ne pri io alia. Ĝuste la unua ĉenero, la enkonduka gramatika-leksika parto, antaŭ la dialogoj de A. Pettyn, ankoraŭ mankas, sed ĝi estas nepre necesa por fari plenan kurson. La enkonduka parto estu simila en stilo al la du dialogo-libroj, do enhavu ankaŭ nur amuzajn, interes- kaj informoplenajn tekstojn, ktp. En preparado de propraj lerno-tekstoj, instruisto apliku la kriteriojn el la antaŭparolo de „Amuzaj dialogoj" – same „iom strikte", kiel faris A. Lienhardt. Mi proponas la lernoplanon, ĉar mi konsideras ĝin plej taŭga por Esperanto (dum kelka tempo mi jam prilaboras la koncernajn materialojn, kaj parte ilin sukcese elprovis en grupoj por plenaĝuloj). Post kiam mi konatiĝis kun „Amuzaj dialogoj", mi konsideras la planon eĉ ideala, por ekposedo de ordinara parola Esperanto, kaj, samtempe, plena gramatiko, k.a.

Fakte, A. Pettyn kaj A. Lienhardt atingis ion nekredeblan en metodiko de fremdaj lingvoj: A. Pettyn por la unua paroliga grado, kaj A. Lienhardt por la dua, kreis idealan serion da dialogoj, kiu komenciĝas de la unua lecio-no en „Ĉu vi parolas Esperante? ", kaj finiĝas per dialogo n-ro 20 en „Amuzaj dialogoj", – ĝi estas tute natura sinsekvo. Kial ideala? Ĉar en ambaŭ dialogo-libroj ĉiu frazo, ekde la unua ĝis la lasta, estas motivita kaj stimulita per situacio, tute versimila por ĝi, kaj devige sekvas el la parola situacio. Kaj la tutaĵo de la dialogoj, en ĉiu libro, prezentas tute versimilan, nature disvolviĝantan pli grandan vivsituacion el ordinara vivo de eŭropano. Kaj ĉiu parto de la situacio, sekve ĉiu dialogo, estas amuza, ĉe ili neniu lernanto enuos. Kaj ĉe ĉio ĉi A. Pettyn gradigas malfacilaĵojn, kaj atingas perfektan ripetiĝon de vortoj kaj parolturnoj – ankaŭ en tute natura parolmaniero. Brila metodika atingaĵo! Nun la metodikistoj zorgu, ke ĝi ne perdiĝu vane, kaj estu plene eluzita.

La metodika atingaĵo, kiun prezentas la du dialogo-libroj, estas tiel grava, ke mi tute ne emas mencii la kelkajn malgrandajn misojn, kiujn dubema instruisto ĉiam povas trovi.

Havigu al vi kaj por viaj lernantoj la du librojn – „Ĉu vi parolas Esperante? " de A. Pettyn kaj „Amuzaj dialogoj en Esperanto" de A. Lienhardt – kaj vi disponos pri belega, perfekte gradigita, moderna, paroliga lernomaterialo por plenaĝuloj, kian aliaj-fremdlingvoj, plej verŝajne, ne posedas.

V. *Goñŝtejn*

El la originalo...

Nguyen. Trai – elektoj el liaj poezio kaj prozo. Tradukis Nguyen Minh Kinh kaj Dao Anh Kha. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo. 1980. 100 p. 18 cm. Prezo por Hungario: 20,– forintoj

Pasintjare, en nro 1980/2 nia revuo primemoris la *sescent-jaran* jubileon de tiu geniulo de la mezepoka Vjetnamio. Tiam, manke de Esperantaj tradukoj fare de liaj samlandanoj, ni devis utiligi franclingvan antologion de vjetnama literaturo, por iomete prezenti la poezion de Nguyen Trai. Kaj nun, kiam ankoraŭ ne ekzistas Esperantlingva antologio de tiu granda orienta nacio, estas valora donaco de la „Ruĝa Rivero" Fremdlingva Eldonejo almenaŭ tiu ekstere modesta, sed interne despli trezorhava kolekto, el la verkaro de la granda verkisto. Probable multaj literaturŝatantoj jam avide atendis ĝin, por pli proksime konatiĝi kun klasikulo de tiu granda Orient-Azia literaturo.

Nepre gravan subtenon servas por la legantoj la – cetere, ne longa – biografia enkonduko, kiu prezentas la mezepokan Vjetnamion kaj el historia, kaj el socia-struktura vidpunktoj, klare kaj sufiĉe koncize por havi paciencon finlegi ĝin antaŭ ol soife eklegi la poemojn. Aŭ la sufiĉe mallongajn, sed aparte interesajn kaj alte prudentajn leterojn, kiuj memorigas pri klasikaj epistoloj de la Eŭropa renesanca periodo. Kaj la pacienco valoras, ĉar helpe de taŭgaj aludoj de la enkonduko (kaj librofine legante la „postparolon" ververe la personajn ĥojn de ĉefministro Pham Van Dong) plifaciliĝas atingi la ĝuon de l' arto de Nguyen Trai. Plejparte lia poezio ŝajnas trista, tamen ne melankolia, sed vivoplena, homar-ama, vere kor-al-kora.

Ĉio ĉi alvenas al la leganto en perfekta senriproĉa Esperanto, tra facile manipulata kaj klare komprenebla lingvaĵo. Niaj vjetnamaj samideanoj admirinde regas nian lingvon: rimoj kaj ritmoj bone lirlas, harmonio kaj muziko de la teksto imponas, okulfrape eĉ se oni ne intencas kritike legi. Sed la tradukistoj estas indaj je kritikoj laŭdaj kaj instigaj al pluaj plenumoj; ja ili ĝenerale trovis taŭgajn Esperantajn ekvivalentojn por interpreti la tempe kaj loke malproksimajn, ofte specifajn aferojn kaj aĵojn de vjetnama naturo, de la mezepoka mondo. Ofte klarigas laŭnecese piednotoj erojn de la tekstoj; al mi foje mankis klarigoj pri prononco de vjetnamaj nomoj. En tia traduka verko bezonas ian lokon ankaŭ la klarigoj pri la originalaj versformoj – tion mi forte atendis trafoliumante la libron. Manke de tiuj ne eblas scii, ĉu fidele, ĉu libere estis interpretitaj la poeziaj teknikoj de Nguyen Trai; kvankam la tradukoj havas indajn poeziajn vestojn, kiel supre jam menciite, tamen la originalo restis bedaŭrinde enigma. Ke tamen eblas perfekte plezuri, tion montru ĉi tiuj belegaj versoj:

La montoj verdas. Ĉe l' bluaj ondoj
dormas barko sur sablejo
La helan nokton, la arĝentan lunon
oni libertempe kontemplas de
la balkono...

Ervin *Fenyvesi*

Rabatitaj ofertoj de la ĉe-Balatonaj hoteloj de DANUBIUS HOTELS por vintra feriado

Ĉe la plej granda varmakva lago de Eŭropo, en Hévíz, en la Hotelo Thermal:

UNUSEMAJNA (7 tranoktoj) RESTADO — inter 3 de januaro – 1 de marto 1982

Prezo en usonaj dolaroj, en dulita ĉambro, por persono — 122,50
(krompago por sola loĝado ne fakturiĝas)
La prezo inkluzivas: dufojan manĝadon tage, bazan kuracadon: kuracistajn ekzamenojn, 6 termobanadojn, saŭnon, 2 masaĝojn

DUSEMAJNA (14 tranoktoj) RESTADO — inter 3 de januaro – 1 de marto 1982

Prezo en usonaj dolaroj, en dulita ĉambro por persono — 364,50
(krompago por sola loĝado ne fakturiĝas)
Plilongigo por semajno — 172,50
La prezo inkluzivas: ĉiujn manĝojn, kompletan kuracistan servadon, komencan, kontrolan kaj finan kuracistajn ekzamenojn, diagnozajn ekzamenojn, balneo- kaj elektroterapiajn kuracadojn, ŝlimobandaĝon, subakvan masaĝon, fototerapion.

* * * * * * * * * * * *

En Hotelo Helikon (Keszthely), sur la bordo de Balatono:

RESTADO KUN TRI TRANOKTOJ — inter 3 de januaro – 1 de aprilo 1982

Prezo en dulita ĉambro por persono	US dol.	30,–
en unulita ĉambro por persono		30,–
plilongigo por tago		10,–

Informoj, rezervo de ĉambroj:

DANUBIUS TRAVELS
1052 Budapest, Martinelli tér 8.
Tel.: 173–652. Telekso: 22–6342

DANUBIUS HOTELS

Gaja paĝo

Intervjuo kun humuristo

– Diru ion pri viaj freŝaj ideoj!
– Nun mi estas ofte meditanta: ĉu aĉeti novan aŭton?
– Feliĉe, ke vi havas tiom da mono!
– Tute ne! Por mediti mono ne necesas!

... kaj kun ŝtelisto

– Ĉu post tiu ĉi puno vi komencos novan vivon?
– Jes, kaj mi klopodos eviti lasi spurojn...

Miskompreno

– Ĉu la aŭguristino vere diris, ke la edzino forlasos vin, Petro?
– Por esti preciza, ŝi nur aŭguris, ke mia vivo abrupte pliboniĝos...

Kaj la egalrajteco? (Do ni transformu):

– Ĉu la aŭguristino vere diris, ke la *edzo* forlasos vin, Klara?
– Por esti preciza, ŝi nur aŭguris, ke mia vivo abrupte pliboniĝos... do li certe revenos!

Kiaj junuloj!

– Karega Marinjo, estu mia unua edzino!

Kiaj geedzoj!

– Mia edzino havas grandan zorgon pri mi. Ĉiuvespere ŝi deprenas mian ŝtrumpon.
– Kiam vi revenas?
– Ne, kiam mi estas ekironta.

Ho, knabino!

– Mia panjo avertis min, neniam kuŝi en liton kun viro... ĉu estas pura ĉi pavimo?

... kaj jarojn poste

Juĝisto: Kial vi akuzas malfidela vian edzon?
Sinjorino: Nu – ĉar mi ne kredas. ke li estas la patro de mia infano!

Sed ankaŭ tiel...

– Finfine staras jam preta nia vilao. Do jam estas temp' por eksedziĝi.

Ne Esperanta verkisto

– Dankon, doktoro! Vi sanigis min de mia megalomanio, nun mi ree iĝis tutplene, sensacie, nesupereble, eblas eĉ diri: fantastike modesta...

Eble Esperanta verkisto

– Mi estas pacema homo! Sed se mi jam atakas iun, mi certe defendos min!

Pardonu! Ĉu tiun enigis la presisto

Bovino rigardas en la areno la fieran virbovon luktantan majeste. Plene ravite, ŝi diras al la aliaj bovinoj:
– Rigardu lin: kia inteligento! Li uzas nur sian kapon!

Ni lasu la ironion!

Laŭ s-ano No No, la s-ano... pardonu! la sano postulas freŝan aeron... por tie ebriiĝi.

Fiŝhokisto

Vizitas vilaĝan restoracion, kie sur la muro li ekvidas grandiozan preparitan ezokon. Li mirigite kapbalancas:
– Kiel lerte sciis mensogi, kiu kaptis tiun ĉi ezokon!

... kaj se ili vetkuras

– Ĉu vi sukcesis kapti hieraŭ ian fiŝon ?
– *Nenion.*
– Ankaŭ mi, sed la mia estis pli granda!

Respondo en „Leterkesto"

„Estimata kaj kara Leganto! Se vi ne komprenas ion en nia gazeto, demandu ĝin de ni senĝene. Ni demandos ĝin de iu."

E. F.

GRANDA TENTO

Kaj se mi donacos al vi tutjaran abonon por Hungara Vivo?

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: **Georgi Mihalkov**

Vojaĝo al Faremido – Kapilario
de Frigyes Karinthy

La verkoj de la elstara hungara verkisto havas esence internacian karakteron. Ankaŭ tial ili prezentas veran ĝuon por ĉiuj Esperanto-legantoj.

1. En kiu jaro aperis unuafoje Esperanta traduko de „Vojaĝo al Faremido"?
2. Kiom da tempo bezonis la vojaĝo al Faremido?
3. Bonvolu daŭrigi la frazon: „Kion do vi, virinoj volas...? "

Limdato por la respondoj: unu monato post apero de tiu ĉi numero.

Ĝustaj solvoj de la demandoj en la n-ro 1980/6:

1. Gregoro donacas la turkan ringon al Eva dum ilia parolado en la ĝardeno de palaco;
2. Kiam sinjorino Eva traserĉis la poŝojn de la kostumoj por doni ilin al Nikolao;
3. „Homoj, prenu armilojn! Danĝero minacas la vilaĝon! Iu fripono mensogis al la turkoj, ke estas ĉe mi la trezoroj de Doĵa, kaj nun la turkoj venos atake."

Libropremion gajnis: Jindřich *Tomišek,* Řikovice kaj Jaroslav *Kašparec,* Praha, (Ĉeĥoslovakio).

LETERKESTO

Zágoni Jenő, Sepsiszentgyörgy, R.: Viaj kursanoj, kiuj senescepte abonis nian revuon, krome ankaŭ nian hungarlingvan frat-revuon „Mondo kaj Lingvo", versaĵne diros dankvortojn al vi, kiu enkondukis ilin en la E-an gazetaron. Domaĝe, tiu ĉi ne estas ankoraŭ tiel densa, kiel la famaj arbaroj en via regiono Csik. Sed ja la plia kaj plua plantado dependos ankaŭ de ili, al kio ankaŭ niaj revuoj atendeble prezentos spiritan subtenon. Korplenan dankon al via brava grupo!

Titova, Nina, Moskvo, SU: La eldonagado de Hungara EA vere strebas provizi la esperantistaron per pli da libroj pri nia movado. Kial? Ĉar la vastiĝanta movado ampleksiĝas ankaŭ laŭ strukturo, kaj tio generas kreskagrade konsciajn movadanojn kaj aktivulojn, kiuj soifas je bonaj kaj profundaj konoj pri la movado mem. Aliflanke, kvankam oni ankaŭ povus diri: paralele, multaj emas enprofundiĝi en la E-kulturon, i.a. por ambicie ekzameniĝi, kaj plenscie aliri al instruado de la novaj aroj. Ankaŭ vi povas aĉeti niajn librojn en la Librejo Drujba de via urbo, kaj se iu eventuale elĉerpiĝis, instigu ilin por rea mendo. Tio ŝajnas publikutila servo – versaĵne vi konsentas, ĉu ne?

Dittrich Breuer, Vieno, A.: Ni citas el via letero: „La psikologia esploro, sed multe pli, ĝia rezulto pri prefero de la koloroj estas io ridindiga. La esploristoj de la Teknika Universitato en Budapeŝto – se s-ano Á. Rátkai bone interpretis ilin – „renversis" per tio la bazojn de la psikologio; verdire ĝuste tial ili fiaskis: universalaj preferoj ne ekzistas! Nek malpreferoj! La scienco delonge tion instruas, ke subjektivaj „preferoj" k.s. *estas dependaj* de tempo kaj loko, de socio kaj jarcento, de socitavolo kaj medio, de la plej diversaj sociaj fenomenoj ĝis la senfino! Ĉu tiuj sinjoroj esploristoj imagas, ke pro la *verda standardo* de Mahometo lia religio konvertis ne pli da popoloj, nur la kvaronon de l' mondo? " Permesu, ke ni ne citu plu viajn argumentojn kaj la kontraŭekzemplojn pri la malrealeco kaj falsa kompreno de la aludita „psikologia esploro". Nia redakcio konsentas kun la – cetere multaj – replendintoj: tiu nia koloro kaj stelo estu nia plej granda „plago"...

Pacjurko, Vladimiro, Pustomyty, SU-Ukraino: La rimarkoj, pri kelkaj gramatikaĵoj en „Elsuĉilo" (HV 1980/5, p. 177) estas de bonaj okuloj ekviditaj. Vere, temas (parte) pri hungarismo ĉe „estingis ilian vivon" (anst. vivojn), kaj „fluetis sur ilian frunton... el sub ilia nigra ĉapelo" (anst. fruntoj, ĉapeloj, kompreneble: iliaj). La logiko kolizias ja en tiaspecaj esprimoj kun la severa gramatika sento – kaj efektive regulo tiucele ne ekzistas. Logiko: ĉar *ili* neniel havas *unu* frunton aŭ ĉapelon aŭ vivon, sed ĉiu havas la sian (unu) kaj ne pli da fruntoj ktp. Do kompreni oni povas sen ia dubo, sed temas ververe pri la pluralsigno. En pluraj lingvoj troviĝas tia dubo: ĉu la ambasadorojn akompanis iliaj edzinoj (do ĉiu el ili havas haremon) aŭ nur unun, kaj tiam oni „devus" skribi „ilia edzino" estis, kiu akompanis la aron da ambasadoro... Do problemo, pri kio diversaj naciaj akademioj diversmaniere kutimas decidi... kaj foje eĉ ŝanĝi la decidon (eble ankaŭ la edzinon, sed tio estas alia/j/ afero/j/, depende de la nombro de la edzinon ŝanĝantaj akademianoj). – La kondicionalo en la pasinto, kvankam ĝi ŝajnas iom komplika, havas sian realecon; ĝin eviti eblas nur per lerta konceptado, ekzemple tiel: „frumatene mi povus dormi... nun – tagmeze – jam ne." Varman dankon pro viaj atentoplenaj rimarkigoj!

Korespondi deziras

Letervesperon, ekspozicion je 775-jara jubileo de *Dresden* helpos sendaĵoj, resp.garantiita. Kulturbund, KAG Esperanto, DDR–8016 *Dresden* Psf. 44. – E-rondo Flamo havos letervesperon, ekspozicion (10. aŭg.) sub devizo: „Ĉiuj homoj bezonas pacon! " Bk k aliaj aĵoj multe helpos! Sendintoj ricevos suveniron. Latvio SU–228 730 *Aluksne* Omskas str. 16-2. N. Kovnators/FLAMO. – Kursfinintoj serĉas leteramikojn tm. en Litovio, SU–234 432 *Pilis* Laim. *Abromas.* – Estonaj gelernantoj (16-18) de lernejo 44. Keskool, *Tallinn* Keskuse 18, Estonio, SU–200 029. – E-klubo „Kopeko" de gejunuloj-komenc antoj bezonas kontaktojn kun kluboj kaj ges-anoj! SU–252 127 *Kiev* ul. 40-let Oktabrja 122/2-28. *Dobjazko Volodja.*

Kuracistoj, kuracistinoj kaj flegistinoj de urba malsanulejo, pri ĉt, precipe medicinaj; ĉiuj en urbo *Preslav,* BG–9850 (en distr. Ŝumen): Eli St. *Salabaseva* (28) kurac.-akuŝistino, str. Javorov 10. – Katja Kr. *Kostadinova* (30) kurac.-pediatrino, str. N. Rilski 6. ap. 35. – F-ino Grozdanka N. *Grigorova* (26) kurac.-pediatrino, str. L. Burgas. – Rajna N. *Huleva* (47) instruistino, str. R. Daskalov. – D-ro Dimitar K. *Slavov* (40) neŭrologo, str. Boris Spirov 27. – Eskul *Palov* (27) kuracisto, str. Vasil Levski 2. – Hamdi *Rafiev* kuracisto, str. Rakovska 7. – Tinka M. *Stanĉeva* (28) flegistino, str. Cerkovski 40. – Donka P. Marinova (38) flegistino, str. Cerkovski 43. – Jordanka T. *Ilinĉeva* (46) rentg. laborantino, str. Karavelov 16. – Slavka P. *Atanasova* (30) flegistino, str. Boris Spirov 63. / G. ap. 10. – Donka A. *Poliĥronova* (30) flegistino, str. K. Metodij 25. – Ĵivka *Mineva* (27) flegistino, str. Ivan Matev 8.

Inĝ. Jerzy *Simka* (28) kun s-ano en tim, pri poŝtmarkoj, PL–41-800 *Zabrze* ul. Kruczkowskiego 32/6. - Inĝ. Andres *Arucja* (28) interesas filatelio, popolarto/kutimoj, lingvoj, interŝ. pm, pk, libroj, insignoj, nepre respondas. Estonio, SU–202 240 *Kehra* Kingissepa 41-41. – Inĝ. Ĵivko *Hristov* (30) pĉt, precipe kun Hungario. BG–7200 *Razgrad* Zavodski ĵilista, bl. A, vh. B, ap. 9. – Mieczyslaw T. *Lapa* (24) mekan. teknikisto, kun gejunuloj el Hungario, pri historio, literaturo k moderna muziko, kol. bk, E-revuojn, dez. ekkoni bone Hungarion. PL–63–330 *Dobrzyca* (voj. Kaliŝ) ul. Cmentarna 57/3. – Milosz *Wroblewski* (21) stud. en teknikumo, interesas historio, geografio, filmo, kol. bk, turismajn prospektojn. PL–93–454 *Lodz* ul. Malczewskiego 35m35. – Žiaunys *Gintaras* (15) studento, ktm, pĉt. Litovujo, SU–235 500 *Mazeikiai* urbo, str. Žemaitijos 9–25.

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** Respondeca redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Tatár-Farkas.** Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** • Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** • Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. • Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** • Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto. (K.H.I. 215–96–162, Budapest 1900 József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,– al eksterlando por unu jaro 90,– forintoj. • Peranto al eksterlando KULTURA, P.O.B. 149, H–1389, Budapest Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 7,– Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – Fejér megyei Nyomdaipari Vállalat, Székesfehérvár. Respondeca gvidanto: Pál Gyenti, direktoro. • **Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704**

ORION 1001
STUDIO

Hi-Fi
TURO



NOVA ***STEREO***



SONO, FIDELO DE
SUPERA GRADO

Hi-Fi

- HiFi Stereo gramofono
- HiFi Stereo AM/FM tuner
- HiFi Stereo amplifilo
- HiFi magnetofono kun kasetoj
- Ujo por magnetofon-kasetoj
- Tenejo por diskoj

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumtурist

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj. 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért

BÁV